

Biblia Revuo



Numero 7
1966

Redaktoro: Donald Broadribb
Melburno, Aŭstralio

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 3* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FINEREADER EXPRESS laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1966.

TABELO DE ENHAVO

LA SIGNIFO DE STEFANO de G. R. Bolster	paĝo 1
DIO LA “PATRINO” de Brian Colles	14
LA KRISTOLOGIO DE LA PAROLADO DE SANKTA PETRO EN AGOJ 10:34-44 de Nicholas Alldrit	31
PRI MITOJ EN LA BIBLIO de Donald Broadribb	35

LA SIGNIFO DE STEFANO

de G. R. Bolster

Unu el la plej gravaj figuroj de la frua Eklezio estas la apostolo Paŭlo. Liaj klarvido, energio, konstrua kapablo kaj abunda spirita vigleco lasis markon sur ĉiuj kristanaj jarcentoj. Tiel impona estas lia genieco, ke facile li superombas aliajn, kies graveco estas nur malpli granda ol lia, kaj la rezulto estas ke la kristana historiverkado ofte ne tute juste traktis gravajn figurojn en la frua kristana movado. Unu tia figuro estas Stefano, pri kies graveco atentigis antaŭ kelkaj jaroj Profesoro William Manson en siaj Baird-Prelegoj pri la Epistolo al la Hebreoj.

La tradicia portreto de Stefano estas familiara. Li aperas kun la efektivigo de la dekana ofico en la Eklezio, kaj estas, laŭŝajne, la dominanta figuro en tiu grupo. Tio apartigas lin kiel jam gvidulon en la greklingva fako de la Eklezio, kiu iĝis unu el la unuaj administrantoj de la eklezia kaso, kiel ankaŭ unu el la plej fruaj kaj plej persvadaj apologiantoj pri ĝia fido. Efektive, tiu dua tasko laŭŝajne estis lia ĉefa okupo kaj donis duan lokon al la originala tasko de dekano. Sed la vigla kaj fortika propagandado pri la kristana fido de Stefano vekis malamon inter influhavaj samtempuloj kaj finfine postulis lian vivon. Sekve li historie koniĝis kiel la unua konata kristana martiro, kaj tion oni kutime opinias lia ĉefa merito por famo. Li mortis kiel heroo, lasante grandiozan kaj emociigan ekzemplon pri kiel Kristano devas morti. Sendube dum la postaj persekutadoj je la Eklezio, memoro pri Stefano donis inspiron kaj kuraĝon al multaj Kristanoj atendantaj la finan horon.

Dirinte tion, ni emas forgesi Stefanon pro la supozo ke lia signifo en la kristana rakonto estas pure epizoda. Iom pli profunde, oni ofte atribuas al Stefano kontribuon malrektan kaj senintencan al du gravaj evoluoj en la frua kristana historio: la plej frua etendiĝo de la Kristanismo ekster juda medio kaj la konvertiĝo de la apostolo Paŭlo. La tragika kaj tro frua morto de Stefano ja estis maskita beno, ĉar ĝi disigis la Eklezion kaj plantis la semon en neanticipitaj regionoj.

Sen tiu persekuto, Antioĥia eble tute ne ricevus la Evangelion, kaj la posta historio de la Kristanismo konsekvence estus tute malsama. Oni facile supozas ke la bezono konservisian ekziston eĉ pli ol la deziro diskonigi la kristanan vojon okazigis la unuan kristanan atestadon en Antioĥia. Sed laŭ la raporto de Luko, tiuj fruaj predikantoj estis kolegoj de Stefano. Sekve vere la Eklezio en Antioĥia estis ido de la sinagoga predikado de Stefano en Jerusalemo, kaj tial konsekvencoj venis rekte aŭ iom malpli rekte el tiu agado. Ni rajtas, do, legitime demandi: kial okazis precize tiu evoluo?

Ankaŭ tute bone estis konekta linio inter la morto de Stefano kaj la konvertiĝo de Saŭlo el Tarso. Kiam oni ŝtonmortigis Stefanon, la ekzekutantoj “demetis siajn vestojn apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo.” Tio sugestas ke Saŭlo el Tarso estis unu el la ĉefakuzantoj de Stefano, kaj apertas por ni grandan panoramon da eblaj rilatoj inter ili. Ili eble estus proksimume same aĝaj, kaj oni povus konjekti ke ili eble iam estis amikoj.

Ĉar ni apenaŭ povus imagi ke Saŭlo restus silenta apude dum oni debatadis pri la mesieco de Jesuo en la Sinagogo, ili probable interdisputis plurfoje. Se Luko ĝuste raportas (ĉu Paŭlo donis al li la informon?), la kontraŭuloj de Stefano imponiĝis per liaj dilektika lerteco kaj intensa konvinkiĝo. Sendube Saŭlo havis por Stefano la respekton de dualisto por brilanta kaj lerta kontraŭulo. Sed tro ofte Saŭlon superargumentis Stefano per sia scio pri la Sankta Skribo kaj per sia glavakra menso. Ekzistis nur unu rimedo por silentigi kontraŭulon kiu havis la talenton de Stefano, kaj Saŭlo devis utiĝi ĝin, kio montras kiom fanatikeco povas korupti ĝenerale larĝaniman karakteron. Sekve li estis parto de la atakanta grupo kontraŭ Stefano en la Sinedrio; li balotis kontraŭ li kiam okazis la decida momento, kaj apudstaris malĝoje aŭ triumfe dum la ekzekutantoj laboris. Sed Stefano kaj kion li reprezentis ne estis tiel facile silentigeblaj. Stefano morta estis pli danĝera por Saŭlo ol Stefano viva. Stefanon oni povis silentigi en la Sinagogo, sed estas dube ĉu li silentiĝis en la

animo de la estonta apostolo. Io stefana, glitema kvalito de la menso kaj koro, ne estis havebla por la religio de Saŭlo, negrave kiom li strebis. Ĉar Saŭlon ŝarĝis skrupuloj, dum li batadis la aeron por defendi Dion kiun li apenaŭ konis. Sed Stefano estis libera kaj lia fido donis al li flugilojn. Kiam li parolis pri Jesuo lia vizaĝo brilis per lumo kiu spegulis la gloron de liaj internaj esperoj. Saŭlo certe konsciis pri la kontrasto inter la riĉa interna kvalito de la religio de Stefano kaj la doloriga malpleneco de la propra, kaj ju pli li persekutis la malpli imponajn membrojn de la grupo de Stefano, des pli li nepre konsciis pri tiu ĉie trovebla kontrasto. Sed tiu kontrasto estis simptomo de pli profunda dikotomio; la supozita neceso mortigi Stefanon certe lasis markon sur tiel nevenĝema animo kiel tiu de Saŭlo. Ĉar ŝtonmortigi Stefanon signifis konfesi malvenkon. Tio pruvis ke li povis starigi problemon kiun oni ne povas respondi per dialektiko kaj ekzegeza lerteco, fakoj pri kiu Saŭlo neniel estis sensperta. Ĉar tiu defio havis karakteron tiel integran, laŭ la vidpunkto de la premisoj de ambaŭ partoprenantoj en la debato, ke Stefano iĝis danĝero nur nur por la paco de la nacio sed ankaŭ por la integreco de ĝia fido. Sed se la fido adoptita de Paŭlo estis defendebla nur per ŝtonoj, kiel ĝi povus validi kiel vojo al Dio. Se karcero, vipado, kaj mortigo estis la solaj armiloj, kiel ĝi povus rezisti movadon kiu predikadis pri interpersona amo kaj pardono al malamikoj? Por inteligento tiel akra kiel tiu de Saŭlo, pli-malpli frue devis okazi agnosko ke lia koncepto pri Dio estas etike malpli alta ol tiu de Stefano, kaj por spirito tiel morale sentema, vivi je tia malalta nivelo nepre iĝas netolerebla ŝarĝo. Negrave kiom li strebis estingi ĝin, la problemo ne estis por ĉiam evitebla kaj la momento de vero devis nepre esti antaŭ la momento de konverto. De la unua kolizio kontraŭ Stefano la estonteco de Saŭlo estis aŭgurebla. Ĉar li ne povis detrui la veron, laŭ lia kompreno, li devis finfine akcepti ĝin.

Tio sendube estis la leciono kiun lia persekutado sciigis al li. La morton de Stefano sekvis furioza persekutado de kiu li estis estro. La viktimoj sendube estis multaj el la grupo de

Stefano, kun kiuj li laboradis dum la epoko de la sinagoga debato. Kvankam ili perdis estron, ili rifuzis oferi sian fidon. Kiuj povis, eskapis el Jerusalemo, kaj sekve helpis diskonigi la doktrinojn kiujn Saŭlo volis silentigi. Persekuto ne nur ne sukcesis, sed ĝi eĉ helpis la aferon kiun ĝi celis detrui. La influon de Stefano kaj de la vidpunkto de Stefano do malrekte disvastigis la viro kiu volis nuligi ambaŭ. Sendube estis amareco kaj perplekso en la koro de Saŭlo el Tarso dum li veturadis al sia horo de fato sur la vojo al Damasko. La morta Stefano plu venkis lin dum tiu lasta fazo de la milito inter ili.

Per ĉio ĉi, Stefano aperas kiel kontraŭulo inda je Saŭlo el Tarso, viro kies morala kaj intelekta staturoj egalas, se ne nun superis lian. Ni tre maljustas al Stefano, se ni konsideras lin nur la plej fruan kristanan martiron, aŭ nur malrektan kontribuon al la konvertiĝo de iu pli grava ol li mem. Stefano, siamaniere, estas egale grava kiel Paŭlo, kaj tute eble farus la laboron faritan de Paŭlo, se li ne tro frue mortis. Nur lia frua morto blindigis nin pri lia vera graveco, ĉar Stefano estis unu el la plej gravaj kaj originalaj pensulo] de la tuta historio de la Eklezio. Li estis homo de tre profunda kompreno, kiu establis la tutan historion estontan de la Kristanismo. Li estis pioniro kiu malfermis fontojn de vero laŭ kiu la kristana generacio vivas.

Kial oni martirigis Stefanon? Kaj kial li triumfis tiel glorie kiam li mortis? Profesoro James Denny diras ke onia vidpunkto pri Kristo decidas la tutan kvaliton de onia religio. En tiu frazo kuŝas la tuta sekreto de la impono de Stefano, ĉar Stefano estis la unua persono en la kristana Eklezio kiu havis plene kristanan koncepton pri Jesuo Kristo. Aŭ, se tiu frazo ŝajnas tro aŭdaca, almenaŭ tio estas agnoskenda: ke Stefano estis la unua kristana estro kiu plene realigis la logikan implicon de la kristana kompreno pri Kristo. Dum aliaj plu predikadis nacian penton por Israelo, Stefano pensas per la terminoj de monda religio; kiam Stefano aperas, Petro, la reprezentanto de la malnova vidpunkto, malaperas kaj nur reaperas post la morto de Stefano, kiel daŭriganto de la

vidpunkto de Stefano. Al Stefano ŝuldiĝas la ŝanĝo en la strategio kaj la kompreno pri la signifo de Jesuo kiu estas ĝia fundamento, ŝanĝo kiu determinis la tutan postan historion de Kristanismo. Eĉ malgraŭ tio, la aliaj nur malklare kaj iom post iom ekkomprenas la implicon de la apero de Jesuo en la historio, kiu ŝajne estis evidenta por Stefano jam de la komenco.

Tiu fakto probable estas la kaŭzo de unu karakterizaĵo de la agado de Stefano. Stefano estis judo el la diasporo, kaj tio, sendube, eksplikas lian specialan orientiĝon. Petro kaj Johano frekventas la Templon, kiu, ĉar ili estis palestinaj judoj, estis por ili natura hejmo. La vidpunkto de Stefano, sendube, ŝuldiĝis ne nur al propra inklino sed ankaŭ al profunde evangelia motivo. Ĝi karakterizas ne nur lian interpreton pri la rolo de la Kristanismo, sed estas simptomo de konvinko ke ĉiaj simboloj kaj ritoj forpasis. Finfine, nur se oni kaptas la mensojn kaj konsciojn kaj volojn oni povas florigi la novan fidon. Se Petro kaj Johano estas Katolikoj donantaj novajn signifojn al antikva kulturo, do Stefano estas Protestanto kiu uzas bibliajn ekzegezajn kaj moralajn persvadojn por konvinki. Ankaŭ estas signifoplena la selekto de Stefano pri sinagogo. Li estas trovata kun rilatoj al la Sinagogo de la Liberigitoj. La Sinagogo, kie la Liberigitoj el Romo kunvenis kiam ili vizitis Jerusalemon. Tio povas esti spuro pri la propra originloko de Stefano, aŭ ĝi povas esti indiko pri lia estonta celo. Ĉar de tiu Sinagogo rekta komunika linio iris al la metropolo de la mondo, kaj ĉar li koncentris sian energion tie, Stefano povus planti Kristanismon en la koro de la Imperio. Kaj ni ja eĉ ne scias ke li malsukcesis pri tio, ĉar la Eklezio de Romo, de nekonata origino, povus eble esti naskata dum Stefano kaj Saŭlo debatis pri la mesieco de Jesuo en Sinagogo en Jerusalemo.

Sed eble ekzistas alia kaŭzo ke ni trovas Stefano en la Sinagogo kaj ne en la Templo. La judoj de la diasporo venis viziti la Templon kun sento pri profunda riverenco kaj anticipe. Jen efektive la spirita hejmo de ĉiu pia judo. Kial, do, ni trovas Stefanon ne en la Templo sed en la Sinagogo? La respondo al tiu demando estas trovebla en la akuzo farita

kontraŭ Stefano, kiam oni jam arestis lin. Ĝin sumigas Agoj 6:13-14 — “ĉar ni aŭdis lin diri, ke ĉi tiu Jesuo, la Nazareta-
no, detruos ĉi tiun lokon, kaj ŝanĝos la kutimojn, kiujn Mo-
seo transdonis al ni.” Jen io plene nova. La du versoj estas
unu el la ĉefaj pivotoj de Agoj. Kiam ni legas ilin, ni ekkons-
cias ke ni renkontas unu el la grandaj momentoj de la
kristana historio. Petro predikis pri Jesuo la plenumigon de
epoklongaj judaj esperoj kaj profanaj aspiroj. Stefano
komprenis lin kiel personon kiu ne nur plenumos la fidon de
la Malnova Testamento sed kiu ĝin anstataŭis. Petro vidis lin
kiei mesion kiu revenos por establi judan regnon, kondiĉe ke
la nacio pentos. Stefano vidis lin kiel universalan savanton
kiu incitas la Eklezion al monda misio. Kia abismo inter tiuj
du homoj! Petro plu ĉiutage vizitis la Templon; li plu
partoprenis en ĝiaj ritaro kaj adoro. Sed Stefano jam
preterlasis ĉion ĉi, ĉar li kredis ke Kristo nuiigis ĝin.
Anstataŭe, li vizitis la Sinagogon kaj tie proklamis la novan
epokon de la mesio tiel ke li indikis ĝian universalisman
karakteron. Se la aŭtoritataj instancoj suspektis Petron, ili
opiniis Stefanon unuaranga herezulo.

Sed ĉu ni ne tro multon trovas en du mallongaj versoj?
Efektive, Luko asertas ke la atestantoj kontraŭ Stefano estis
falsatestantoj. Kiel falsaj? Ĉu ili falsis lian fundamentan kom-
prenon, aŭ la specifan esprimon pri tiu kompreno? Facile oni
povus kapti deklarojn faritajn dum arda debato, aŭ elŝiri es-
primojn el la kunteksto kaj tordi ilin por fari ion neniam
intencitan de Stefano. Sed tiuj vundeblaj deklaroj tute ne est-
us farataj dum la momenta ardo, se ili ne rilatus, eble kiel ne-
intencitaj deduktoj, al la centraj principoj de Stefano. Ĉu fa-
cile debatanto kun la kvalito de Stefano permesus tian pre-
mon ke ili farus tian falsan deklaron? Similaj esprimoj, ŝiritaj
el la kunteksto, sendube fariĝis sufiĉe ofte dum la batalado de
Stefano, kaj sufiĉe akordis kun liaj fundamentaj supozoj, por
fari la akuzojn kredeblaj. Sendube oni metis venenan
intencon kaj misprezenton en la akuzojn, sed ankaŭ sendube
ili estis tiel ĝustaj kiel tiuj poste faritaj kontraŭ Petro. (Ĉu ne
eblas ke ni nun trovas stilcelan memoron pri simila situacio

en la vivo de Jesuo?) Du linioj de la atesto renkontiĝas por subteni tiun konkludon. Unu estas la sindefendo de Stefano mem, donita en ĉapitro 7 (kaj pri kiu mi ne povas trakti en ĉi tiu artikolo, pro spacmanko). La alia estas la tuta evoluo de la kristana misio de la epoko de Stefano, kiel raportas Agoj 8-11 specife.

Ĉapitro 8 parolas pri la laboro de Filipo la Evangeliisto, Filipo, kies nomo staras apud tiu de Stefano en la listo donita en Agoj 6, povus bone esti intima amiko de Stefano, kaj ŝajnas saturita per lia vidpunkto. Li estas la unua kiu klopodis plenumigi la ordonon de la Sinjoro atesti en Samario. Por fari tion li devis transcendi firme radikitajn emojn judajn, kiuj eble ne estis tiel fortaj por li ĉar li estis judo el la diasporo. Al la Samarianoj, laŭ la kvara Evangeliisto, Jesuo unue anoncis la spiritan kaj universalan karakteron de la vera religio, kaj al ili unue prezentiĝis la Evangelio kun sia karaktero de universala religio, laŭ la raporto de Agoj. La afero ne povas esti plene hazarda, do indikas veran historian situacion en la vivo de la frua Eklezio. Ambaŭkaze, la predikado malakceptita en Jerusalemo vekis respondon en Samario, kaj en la raportoj de Agoj ĝin validigis la tipa fenomenaj karaktero de la ekapero de la mesia epoko.

En la dua parto de la ĉapitro ni trovas ke Filipo akompanas veturanton al Jerusalemo. Ni ne certe scias kiel kategoriigi la etiopan eŭnukon. Eble li estis konvertito. Pli probable, judo el la diasporo, kiu dungiĝis en fremda palaco, ne nekonata evento. Eble li apartenis al grupo de judoj de longe loĝantaj en Etiopujo. Li legadis la Sanktajn Skribojn hebree, kaj tio sugestas ke li estis intimite ligita al sia hejmlando. Aliflanke, lia demando al Filipo supozigas ke ne estas familiara al li la ekzegezo de la legaĵo. Filipo utiligas la oportunon por klarigi la kristanan signifon de Jesuo al li, rezulte ke la eŭnuko kornvertiĝas al la nova movado. Sendube oni komprenu ke de li venis eble nova kristana komunumo.

Ekzistas simileco kaj diferenco inter la rakonto pri la konvertiĝo de la eŭnuko kaj de Saŭlo el Tarso en ĉap. 9.

Ambaŭ veturas, akompanate de oficistaro. Ambaŭ konvertiĝas al fido je Jesuo, ambaŭ baptiĝas en la novan movadon Tie ĉesas la simileco. La eŭnuko ne sciis la signifon de la Sankta Skribo, sed tre volis lerni. Saŭlo bone manipulis la Torah-n, sed estis blinda pri ĝia esenca signifo. La eŭnuko estis humila, kaj respondis kiam li unuafoje aŭdis la Evangelion, malgraŭ sia alta rango. Saŭlo fiere rezistis mesaĝon kiun li sendube aŭdis milfoje. La simpla atesto de Filipo sufiĉis por konverti la eŭnukon al oboe al Kristo. Vizio kaj voĉo el la ĉielo estis necesaj por surgenuigi Saŭlon; same kiel en la posta ĉapitro vizio kaj voco el la ĉielo estis necesaj por persvadi Petron ke li venku sian skrupulon pri vizito al Kornelio.

Kornelio estis roma oficisto, kiu pie serĉis Dion. Oni karakterizas lin kiel timanton je Dio, t.e. teknika termino por nomi la nejudajn konvertitojn, kiuj restis ĉe la rando de judismo. Ili akceptis la judajn monoteismon kaj etikon, sed ne akceptis la plenan postularon de la Torah, nek cirkumcid-iĝis. El tiaj grupoj venis multaj el la fruaj konvertitoj de la misio al la nejudoj. Rilate al Kornelio, ni lernas ke la serĉanto pretis por la mesaĝo venonta al li, sed la mesaĝisto ne pretis alporti ĝin. Petro, la grava kristana gvidanto, malrapidis al tiu serĉanto. Kornelio ne estis judo, kvankam li estis konvertito kiu adoris la Dion proklamatan de Petro. Vizio estis necesa por vekti Petron kaj konsciigi al li la veron kiun tute klare vidis Stefano. Kaj multa lerto de la apostolo estis necesa por konvinki multajn sekvantojn ke li prave agis.

Ni trovas intencitan lertecon en la elekto kaj sinsekva priskribo de tiuj eventoj. Laŭ judaj opinioj, la Samarianoj posedas malpli ol duonan religion. La eŭnuko, oficisto de nejuda reganto, sendube malrigore rilatis al multaj el la reguloj de sia religio, kaj Kornelio simple ĝuis la flank-avantaĝojn de Judismo. Sed ĉiuj respondis al la kristana mesaĝo, dum Saŭlo la Farizeo kaj Petro la Apostolo nur obeis post rekta dia ago. La mesaĝo estas klara, kaj koincidas kun la fundamenta supozo de la filozofio de Stefano, deklarita en ĉap. 8. Krome, ni vidas nemulte kaŝitan kontraston inter la gvidanto de la

Eklezio en Jerusalemo kaj Filipo amiko de Stefano kies sento pri la interna admono de la spirito kaj kies liberala vidpunkto akre kontrastas kun la malvolonta oboe de la gvidanta apostolo. Pli profunde, ni vidas nekaŝitan akran kontraston inter Stefano, unuflanke, kaj Petro kaj Saŭlo el Tarso aliflanke, la du ĉefaj gvidantoj de la frua Kristanismo. Ilin puŝis al respondeco pri vastiĝinta kristana misio serio de dramaj, miraklaj agoj; sed neniam tia speciala rivelacio venis al Stefano. Li aperas tute nedramece. Li konigas sian vidpunkton kiel ion esencan en la karaktero mem de la krista evento. Jen indiko pri la spirita matureco kiu karakterizis lin ek de la komenco, ke li bezonis neniam alian ekipon por tio ol ke li estis homo plena de saĝo kaj de la Sankta Spirito. Sed, denove, tre matura sperto pri la spirito lasis markon sur la Kristaneco de Stefano. En la fruaj ĉapitroj de Agoj la ĉeeston de la spirito indikas ĉiaj preternaturaj fenomenoj. Nur en la postaj ĉapitroj ĝi laboras per la normalaj partoj de la homa psiko, sed precize tiel ĝi agas en Stefano dekomence. Per tio, kiel per ĉio alia, Stefano estas antaŭtempa, anticipante la sperton de aliaj kristanaj gvidantoj rilate al sperto kaj ne nur vidpunkto; matureco kaj ne nur strategio; efektive, ju pli oni studas la ateston, des pli oni inklinas opinii ke li estis la plej grava el ĉiuj Kristanoj.

Simila celo kuŝas en la fundamento de la evoluo de la sinsekvaj eventoj. Klare la impulso venas el Stefano. Preskaŭ de la momento kiam li aperas, la kristana movado ĉesas esti nur porjuda movado. Paŝon post paŝo ĝi iras al la atendanta mondo responde al la vidpunkto de Stefano. Lia mallonga predikado estas la decida punkto, kaj lia impreso abundis kaj efikis. De Jerusalemo al Samario, de Samario al Etiopujo, de judoj al konvertitoj, fine, ĉe Antioĥia, de konvertitoj al la nejudaj mondo, la Eklezio iras antaŭdestinitan vojon, en la evoluo kiun certe antaŭvidis Stefano, ĉar ĝi estas implica en lia interpreto pri Kristanismo kaj lia koncepto pri la rolo de Jesuo el Nazaret en la celoj de Dio. Preskaŭ tutan, la mision entreprenis la kolegoj de Stefano, dum la gvidantoj de la

Eklezio en Jerusalemo malvolonte sekvis, kontentante sendi deutojn por certigi ke la novaj movadoj sekvas la ĝustajn vojojn kaj akceptas la rajtojn de la patrina Eklezio en Jerusalemo. Efektive oni povus argumenti ke la persekuto post la morto de Stefano kaŭzis la novan evangelian dispredikadon. Sed oni tiel miskomprenus la situacion. La persekuto nur donis oportunon por la disiranta prediklaboro. La kaŭzo estis pli profunda, en la speciala interpreto pri Kristanismo kaj la Eklezio, origininta ĉe Stefano kaj diskonigita de liaj posteuloj. La klimakson de la movado oni atingis, kiam Kristanismo venis al Antioĥia. Tie, unuafoje, la Evangelion oni rekte predikis al nejudoj. Tio evidentiĝas el teksto kie oni distingas inter la personoj kiuj predikis nur al la judoj kaj la personoj kiuj predikis al la grekoj. Estas klare ke ili estis sekvantoj de Stefano, ĉar ili estis inter la personoj disveturintaj post lia morto. Ĉar la apostoloj kaj aliaj restis en Jerusalemo dum la persekutado, klaras ke ĝi ne afliktis la tutan Eklezion sed celis nur la liberalan grupon de Stefano. Kelkaj el ili portis la mesaĝon al Antioĥia, kie la disĉiplojn oni unuafoje nomis kristanoj. Efektive, la nomo eble originis inter la nejudoj pri ia miskompreno pri la kristana mesaĝo; eble inspiro en la drinkejo aŭ laborejo, de iu nekonata ŝercemulo, donis nomon al la epoko. Eble ĝi estis nomo donita al si mem de la Eklezio por distingi sin de la Sinagogo, sed tio ne estas egale probabla. Tamen, negrave kial, la Eklezio nun havis propran nomon kaj pretis koniĝi inter la nejudoj. Kaj impresas ke la nova nomo donita inter nejudoj al movado kiu celis venki la mondon estis la greka formo de la vorto mesio. Finfine oni komencis kompreni ke la mesieco de Jesuo estas universala, kaj ne estas enkarcerigebla per reteno en unu, nacia religio. Jen la vero por kiu strebis Stefano, kaj por kiu li volonte elviviĝis.

DIO LA “PATRINO”

de Brian Colles

La Granda Patrino

La koncepto pri patrino dio estas tre vaste konata en la religioj de la mondo. En la tri grandaj fidoj originintaj en la idaro de Abrahamo, t.e. Judismo, Kristanismo, kaj Islamo, la situacio estas malsama, tamen, ĉar ĉefa estas koncepto pri virseksa dio, tiel ke oni adoras Dion kiel mastron kaj kompateman Patron. Tamen, la koncepto ke dio estas ina, adorata kiel la Granda Patrino aŭ Dia Virino, estas klare videbla en ĉiuj etapo de la historio de religioj. “Adorata de Egipto ĝis Hindujo, de Grekujo kaj Anatolio ĝis malluma Afriko, la Granda Patrino ĉiam konsideriĝis diino de ĉasado kaj de milito; ŝiaj ritoj estis sangaj, ŝiaj festoj orgiaj.”¹ Tiel Erich Neumann indikas por ni la amplekson kaj karakteron de la adoro al la patrino dio.

Aliloke, en la kadro de konsiderado laŭ la vidpunkto de junga analiza psikologio, la sama aŭtoro eksplikas ke la figuroj de la Granda Diino pentritaj en homaj mitologiaj kaj artaj kreaĵoj estas simbola esprimo pri la psika fenomeno nomata de analiza psikologio “la prototipa bildo,” t.e. “arketipo” de la Granda Patrino, kiu mem estas parta aspekto de la pli vasta koncepto kiun oni nomas la “arketipa ineco.”² Oni notu ke, laŭ la opinio de Jung, arketipo ne estas konkreta bildo ekzistanta en tempo kaj spaco, sed pli ĝuste, interna inklinado al koncepto, aktiva en la homa psiko. Alivorte, “temas pri mensa afero,” kaj tio aplikendas al la figuro de Dio la Patro, ankaŭ. Sekve, la ĉie trovebla troviĝo de la Granda Patrino estas manifestacio en mitologiaj motivoj de unu el la grandaj arketipoj de la “kolektiva malkonscio” de la homaro, aperantaj ĉe ĉiuj popoloj laŭ simila maniero.³ Ni povas malakcepti la interpreton de Jung pri tia religia fenomeno, aŭ ni povas asimili ĝin al nia konceptaro per la aldono de metafizika “bazo” al lia psikologio. Certe lia esplorado substrekis la universalecon de la Granda Patrino.

La karakterizo farita de Neumann pri patrinoj dioj, supre

citita, kun emfazo pri la viraga aspekto, memorigas al ni ke ilin amas kaj timas samtempe la adorantoj, ĉar ili estas ne nur patroninoj de amo kaj milito, sed ankaŭ ofte havas subteran aspekton, konekton kun la morto, Tial, pli kompleta titolo estas “La Granda kaj Timinda Patrino,” apud la pli respektinda aŭ virga nomo “La Dia Sinjorino.” Aldone, la Granda Patrino havas filon amantan, la figuron de Attis, Osiris, Adonis, aŭ Tammuz, kiuj kutime estas forĵetataj kiel edzoj de araneoj, farinte sian fekundigan laboron.

La profeto Jeĥezkel, en la Malnova Testamento, vidis per vizio virinojn, kiuj sidis apud la norda pordo de la Templo en Jerusalemo kaj lamentis pri Tammuz (Jeĥezkel 8:14), tiel ke klare similajn kredojn havis kelkaj partoj de la izraelaj religianoj. Tiuj karakterizaĵoj, kaj aliaj, estas klare videblaj en la orgiaj ritoj okazigitaj en la kulto de la kanaanidoj dum la bronza epoko.⁴

La Patrino Dio kaj Saĝeco

Kiam ili estis pli donacemaj, la patrindioj povis doni saĝon, konsilon, aŭ instruon al la dioj kaj al la homoj. Tiu kredo estas facile komprenebla, ĉar la patrino ja donas al la infano ties unuan gravan edukon. Simile, oni kredis ke saĝeco, en la formo de diaj orakoloj, venis el la subtera mondo, el la Patrino Tero.

La koncepto pri la tero kiel la patrino de la homaro ne mankas en la hebrea tradicio; Jesuo ben Sirah, la juda verkinto de la 2a jarcento antaŭ Kristo, atestas:

*Peza jugo premas la filojn de Adamo,
De la tago kiam ili venas el la patrino utero
Ĝis la tago kiam ili reiras al la patrino de ĉiuj homoj.
(Sirah 40:1)*

Jen la sinistra aspekto de la diino de la tero, kiu reakceptas sian propran idaron en la formo de sangaj oferoj kaj kadavroj por fari sin fekunda.

Aliflanke, Patrino Tero donas saĝon. En la greka mondo,

Dio la “Patrino”

la tera diino Gaia havis la taskon mamnutri Zeŭson, kaj ankaŭ instruis homojn kiel orakol-diino por pluraj grekaj urboj. Gaia donis orakolojn per la Pitio, kiu sidis sur tripeda seĝo super fendo en la tero ĉe la Templo en Delfi, antaŭ ol Apolo kaptis la lokon.⁵

Parenca religia fenomeno estas la numinosa ina karaktero de la arbo, honorita inter la Semidoj ĉe la “altaĵoj” kaj aliaj preĝejoj. En la formo de la Aŝeroj, la kultaj stangoj de la diino Aŝera, tia adorado estas konata ankaŭ per la Biblio.

En la helenaj kaj ĝermanaj landoj ni trovas la kredon pri la profeta potenco de arboj, kiel ekzempligas por ni la orakolo de Zeŭso en la sankta kverkaro de Dodona. En unu parto de la Malnova Testamento, la sono en la supro de la morusarboj estis signo de Jahŭe ke David ataku la filiŝtojn. (2 Samuel 5:24.) Krome, ni legas pri “kverko de aŭguristo” (*elon moreh*) duloke en la Pentateŭko (Genezo 12:6; Readmono 11:30), frazo tradukita de J. Lindblom kiel “terebinto de aŭguristo,” ĉar li sugestas ke la nomon donis oni al la sankta arbo, pro la kutimo de profetoj sidi tie dum ili donis siajn orakolojn.⁶ Debora havas plurajn karakterizaĵojn de profeto, ŝi sidas sub arbo kaj donas ordonojn, kaj, kiel araba *kahina*, ŝi incitas Barakon kaj la armeon kontraŭ la malamikoj.⁷ “Ŝi sidadis sub la palmo de Debora. . . kaj la izraelidoj venadis al ŝi por juĝo.” (Juĝistoj 4:5.) Ŝin oni atentinde nomas la “patrino en Izrael” (Juĝistoj 5:7), kio, laŭ P. de Boer, signifas “persono kiu determinas la estontecon de la popolo, estante konsilisto.” La rakonto pri la saĝa virino el Abel (2 Samuel 20:14-23), laŭ de Boer, subtenas tiun interpreton, ĉar denove ni trovas la frazon “patrino en Izrael” (v. 19), kie temas pri Abel “urbo de konsilado, fama orakol-loko en Izrael.”⁸

Krome, vaste konata en la religioj de la mondo estas la vidisto-pastro kiu, oferinte sian mion kaj iniciĝinte per sia sinidentigo kun la Granda Patrino, donas orakolojn el sia malkonscio. Alternative, virino povas havi tiun rolon, kiel la Pitio. Oni trovas kelkajn spurojn de la patrinobsedita vidisto en la Malnova Testamento: ekzemple, eble la *komer*⁹ de 2 Reĝoj

23:5; Hoŝea 10:5; kaj Cefanja 1:4; kaj sendube la 400 profetoj de Aŝera invititaj al Monto Karmel (1 Reĝoj 18:19ss.). Tiuj aŭguristoj de Aŝera ankaŭ aperas en la ugarita Baal-a mito, kaj sorĉisto (*ummanu*) de Aŝera estas menciita en la letero de Taanaĥ 1.¹⁰

Oni distingas en la religio de Izrael inter la vidisto kaj la posta profeto, pri kio probable temas noto en 1 Samuel 9:9, "kion oni nun nomas profeto, tion oni antaŭe nomis antaŭvidisto."¹¹ Neumann sugestas ke, kontraste, la esenca karakterizo de la hebrea profeto, kompare kun la patrinobsedita vidisto, estas "lia ligo kun la patro-figuro kaj la konserviĝo kaj intensiĝo de konscio per tiu ligo."¹³

La Proksimorienta Patrino Dio

Necesas rimarkigi ke ne ĉiu virina dio apartenas al la kategorio de patrindioj; multaj el ili estas nur kolegoj de potencaj virdioj, kaj sekve ofte estas nur hipostatigo de ia trajto de la pli impona edzo. Tial la nomo de la edzino de la babilona skribista dio Nabu (Nebo) estis Taŝmetum, t.e. "aŭdo," por indiki ke ŝi nur personigas la kapablon de Nabu aŭdi preĝojn. Ĉu la figuro Saĝeco havas tian rilaton kun Jahŭe estas diskutote, sed nunmomente ni povas konsideri citon el Jung por montri kiajn rimarkindajn, kvankam ne-certajn, konkludojn oni povas atingi per komparo de hebreaj tradicioj kaj simboloj kun similaj en la proksimoriento. Parolante pri Saĝeco, speciale kiel priskribita en Sirah 24:3-18, li diras:

Ŝi estas la ina numeno de la "metropolo" par excellence, de Jerusalem, la patrino urbo. Ŝi estas la amata patrino, la bildo de Iŝtar, la pagana urbdino, Tion konfirmas la detala komparo de Saĝeco kun arboj, ekz. la cedro, palmo, terebinto, olivo, cipreso, kc. Tiuj arboj ĉiuj, jam de antikve, simbolis la semidan am-kaj-patrin-diinon.^{12,}

Flankenlasante tion por nun, ni povas oportune konsideri Iŝtaron ekzemplo de la Dia Virino.

Iŝtar estis la ĉefa diino de la mesopotamia panteono. Ŝi

Dio la “Patrino”

havas ĉiun karakteron jam renkontitan: konekton kun la fekundeco de kampoj, patronino de amo kaj milito, rolanta en la subtera mitologio per sia subiro al la submondo, amanta Tammuzon, oni apelis ŝin la “kompatema patrino.” Krome, ŝia saĝeco meritigis por ŝi la titolon *malikatu*, “konsilanto.”

Iŝtaron oni ankaŭ nomas “la potisto,” kio invitas nin kompari biblian tekston, Psalmo 139:15s.:

*Ne estis kaŝitaj antaŭ vi miaj ostoj,
Kiam mi estis kreata en kaŝiteco,
Kiam mi estis formata en la profundo de la tero.
Mian embrion vidis viaj okuloj.*

La homo estas formita el la tero, ideo esprimita per la vorto *yšr*, kion oni ankaŭ uzas por esprimi la laboron de potisto (Genezo 2:7s.). Tamen necesas noti ke kiam Izrael deklaras al Jahŭe “ni estas la argilo, kaj vi estas nia potisto,” ili ankaŭ deklaras “vi estas nia patro” (Jesaja 64:8).

En Mesopotamio Iŝtar estas konata kiel la “virino ĉe la fenestro” kaj pli malproksime ŝi aperas kiel Afrodite Parakuptousa. Tiu vorto *parakuptousa* aperas en la septuaginta traduko de Sentencoj 7:6 por priskribi la agadon de la “fremda virino” (de la instruanto de saĝeco, laŭ la masora teksto). Laŭ la greka kaj siria versioj, ni povas traduki versojn 6-7 tiel:

*Ĉar ĉe la fenestro de sia domo
Ŝi rigardas tra sia krado
Kaj vidas inter la naivuloj junulon,
Ŝi rimarkas inter la junuloj sensenculon.*¹⁴

Kompreneble, oni povas tute senkulpe rigardi tra la fenestro, ekz. en 2 Samuel 6:16 kaj Juĝistoj 5:28, sed Izebel, adoranto de la kanaana fekundec-diino, “kolorigis siajn okulojn kaj beligis sian kapon” (2 Reĝoj 9:30) prepare por rigardi tra la fenestro al Jehu. Estas atentinde ke tiu motivo estas pentrita sur ebonaj plakoj el Samario.¹⁵

Iŝtar rolas familiare kiel la dia mamnutristino, por la granda asiria reĝo Assurbanipal. En la Antikva Proksima Oriento dioj kaj reĝoj, laŭ onia kredo, estis mamnutrataj de diinoj. En la ugaritaj tekstoj, Dio profetas pri Yassib, la filo

de reĝo Krit, ke li "suĉos la lakton de Aŝera, li prenos lakton el la mam(j) de la virgulino (Anat), la mamnutristino(j) de (la dioj)." Samon oni diras pri Krepusko kaj Paco (Ŝaĥar kaj Ŝalim), la "mizerikordaj dioj."¹⁶ Tio probable estas maniero diri ke la diaj kvalitoj forto kaj saĝeco estas donitaj al la reĝo.

Tiuj du kvalitoj estas ankaŭ atribuitaj al Jahŭe, ekz. en Ijob 12:13-16, kaj 3:5ss, kie la saĝeco kaj forto de Dio estas ligitaj al la surtronigo de reĝoj. En Mesopotamio ni trovas bildon pri Suno, sur la steleo de Hammurabi, donanta la reĝan insignon (ne la leĝojn, malgraŭ la populara supozo). Sed la sama rolo estas ankaŭ atribuita al Iŝtar:

Kreintino kaj majestulino, sinjorino de la popoloj, diino de la homoj...donanta la sceptron, la tronon, la reĝajn insignojn al la reĝa asembleo....⁷

Similan pretendon faris la biblia Saĝeco:

*Per mi reĝas la reĝoj,
Kaj la estroj donas leĝojn de justeco.
Per mi regas la princoj
Kaj la potenculoj kaj ĉiuj juĝantoj sur la tero.
(Sentencoj 8:15s.)*

Ĉia diskuto pri ebla dia fileco de la izraela reĝo apartenas al la rubriko Dio la "Patro," kaj tial ne estas konsiderota ĉi tie.

En du nekutimaj tekstoj Cion estas prezentita kiel "metropolo," iom simile al la urb-diino Iŝtar, kiel patrino kiu suĉigas per "la brustoj de ĝiaj konsuloj" (Jesaja 66:10s.). Inverse, ŝi mem prenas lakton el iom strangaj fontoj, "vi nutros vin per la lakto de la popoloj, vi suĉos la mamojn de reĝoj" (Jesaja 60:16).

La Kulto al la Patrino Dio en Izrael

La diversa atesto ĝis nun konsiderita montras ke en la Malnova Testamento ja estas motivoj kiuj havas karakteron de fekundecaj kultoj kaj patrinaj dioj. Cito el la profeto Jeremia pli certigas nin:

*Ili diras al ligno "vi estas mia patro,"
kaj al ŝtono, "vi min naskis." (2:27)*

Nun, per ironia inversigo de la funkcioj de la “Aŝera” kult-stango kaj la “maŝeba” ŝtona stango, Jeremia kondamnas la izraelan fekundecan kulton, same kiel la antaŭaj profetoj, speciale Hoŝea. Jeremia vidis publikan malakcepton de tiaj sinkretismaj ideoj kaj aparatoj dum la reformo de reĝo Joŝija, (2 Reĝoj 23:1-24), tamen la agado daŭris. Malgraŭ tio, en la ortodoksa fluo de la izraela religia kredaro, ekzemple tiu trovebla en Readmono, virinaj dioj estis anatemataj, kaj efektive la biblihebrea lingvo eĉ ne havis specialan terminon por “diino.”

Evidentaj ekzemploj de sinkretismo estas la importo de Baal kaj lia edzino Aŝera, de Izebel, en la regnon de Ahab dum la 9a jarcento a.K., kaj la sceno en la 7-jarcenta Jerusalema kaj aliaj urboj de Judujo, kie infanoj kolektas lignon por la bruligoj, kiujn okazigos la patroj por adori la “Reĝinon de la Ĉielo” (Jeremia 7:18). Poste, ni trovas ke la profeto admonas personojn kiuj, paradokse, insistis ke la Venkiĝo de Jerusalema kaj la Ekzilo rezultis rekte pro la neglekto de adorado al tiu Reĝino de la Ĉielo. Male, respondis la profeto, la apostateco de Judujo for de Jahŭe okazigis tiujn katastrofojn (Jeremia 44).

Ni povas trovi kelkajn pli klarajn menciojn pri frua eniro de la diinoj en la izraelan mondon, kun la nomoj Aŝtarte, Aŝera, kaj Anat¹⁸ “tri apartaj, sed neklare diferenceblaj manifestacioj de la arketipa Granda Patrino...La arketipo ankoraŭ ne dividiĝis por montri la firmajn figurojn de apartaj diinoj.”¹⁹

Arkeologio donas ateston pri la adorado al virinaj dioj en la izraela teritorio, speciale plakojn kaj statuojn. Kiam J.B. Pritchard entreprenis studi la palestinajn statuojn, li ne povis fari definitivajn konkludojn:

*Ni devas konkludi ke ne estas rekta atesto, por ligi la nudajn inajn figurojn, reprezentitajn sur la plakoj kaj statuojn el Palestino, kun iu el la ĉefaj diinoj...Ĉu temas pri la diino mem, prostituitino de la kulto al la diino, talismano uzata por simpatia magio, por stimuli la naturajn naskprocedojn, estas ankoraŭ nedecideble.*²⁰

Iukaze, la atesto ilustras la gravecon de la patrino motivo por

la ordinara Izraelano, kaj, kiel ni nun vidos, tiu sento estis spegulata ankaŭ en la ortodoksa religio.

La patrineco de Jahŭe

La Biblio estas riĉa je metaforoj kaj aliaj tropoj, kiuj donas bildimagon al nia menso kaj helpas kompreni la rilaton inter Dio kaj la Homo. Tiaj estas la multaj antropomorfaj titoloj atribuitaj al Jahŭe en la Malnova Testamento: Patro, Edzo, Reĝo, Paŝtisto, Instruisto, kc. Tiuj epitetoj kaj metaforoj estis prenitaj el la kultura medio de Izraelo, kaj el historia sperto. Oni povas nomi Dion Roko, kaj Izraelon vito, sed la dioj de politeismo estis plejparte personigo de naturaj bildoj, ekz. ĉielo, ŝtormo, steloj, sed la mensa bildo pri Jahŭe estas preskaŭ senescepte bildo pri persono kun kiu oni povas persone rilati. La koncepto pri patrineco eĉ estas atribuita al Jahŭe, kvankam ĉifoje temas pri similigo anstataŭ rekta metaforo, per la uzo de la hebrea prepozicio *k* "kiel." Li *estas* Patro por Izraelo, sed li estas *kiel* patrino por Izrael. Do, parolante al "siaj servistoj," li deklaras:

vi suĉu;

sur la brakoj (t.e. de Jerusalemo) vi estos portataj,

kaj sur la genuoj vi estos dorlotataj.

Kiel homon, kiun konsolas lia patrino,

Tiel mi vin konsolos.... (Jesaja 66:12s.)

Eblas ke simila bildo ankaŭ ekzistas en bone konata problem-teksto, Hoŝea 11:4, kiu estas parto de teksto pritraktanta la zorgeman amon de Jahŭe la Izrael; oni kutime komprenas ke ĝi temas pri la forpreno de peza jugo for de la makzeloj de besto. P. R. Ackroyd sugestas allogan tradukon kiu necesigas malmultan korekton de la teksto, kaj merito-plene plivastigas la bildon pri Dio kaj Izrael kiel patro kaj infano, jam videbla en la teksto ("Mi instruis al Efraim la iradon."):

Mi estis por ili kiel levanto de bebo sur la mamon,

Kaj mi metis antaŭ ilin la manĝaĵon.²ⁱ

la bildo tie estas plejprobable pri viro, sed la bildo en Jesaja

Dio la “Patrino”

49:14s. estas tute klara:

*Ĉu povas virino forgesi sian infaneton
kaj ne kompati la idon de sia ventro?
Eĉ se ili forgesos,
Mi vin ne forgesos. (T.e. Cionon)*

Kun simila aspekto estas la bildo pri la Filo de Dio, staranta antaŭ Jerusalemo:

*Kiom ofte mi deziris kolekti viajn infanojn,
Kiel kokino kolektas sian idaron sub la flugilojn,
Kaj vi ne volis! (Luko 13:34.)*

Ankaŭ, la kerno de la mallonga Psalmo 131 resonigas mal-laŭte la patrinecon de Dio:

*Ho Jahŭe,
Kiel infano trankviligata ĉe la mammo de sia patrino,
Kiel infano kvietigata estas mia animo. (Psalmo 131:2.)*

Oni ankaŭ diras ke Jahŭe utiligis homajn agentojn por patri-numi Izraelon. Sekve, dum malespero Moseo ekkriis:

*Ĉu mi embriigis tiun tutan popolon? Aŭ ĉu mi ĝin naskis,
ke vi diris al mi: “Portu ĝin sur via brusto, kiel portas
nutristino (’ōmēn) suĉinfanon”...? (Nombroj 11:12.)*

Aliloke oni rigardas Moseon kiel la agenton de Jahŭe por la edukado de lia filo Izrael; nun li rolas kiel nutristino, kvankam *virseksa* nutristino, por la “infanoj de Izrael.”

La antikva hebrea dia nomo Ŝaddaj, kaj la titolo “Roko” aplikata al Jahŭe, devas ankaŭ atentigi nin tiurilate. “Roko” estas apelacio pri la Dio de Izrael ne prenita el la homa socia medio. Kiam ĝi estas uzata en la Kanto de Moseo (Readmono 32), ĝi estas ligita kun la koncepto pri patreco: “ĉu ne li estas via patro, kiu vin kreis?” Sed en la sama ĉapitro ni trovas pli ambiguan deklaron: “La Rokon, kiu vin naskis, vi perdis el la memoro, kaj vi forgesis la Dion kiu vin estigis.” (*l mĥllk*) (32:18; kp.15). Kvankam Patro kaj Roko estas denove apudmetitaj en Psalmo 89:27s., konektite kun la Davidida reĝo, ni ne povas eskapi la fakton ke la bildo en la Kanto de Moseo estas ne nur pri patreco, sed pri patrino naskanta sian infanon. La sama verbo (v.18 hjl), esprimo pri dolora naskado,

estas uzata pri naskanta virino en Psalmo 48:7, kaj pri Dio kiu naskas la teron kaj montojn en Psalmo 90:2. Ni ankaŭ komparu la naskiĝon de Saĝeco (Sentencoj 8:24s.).

Kompreneble, la Rok-simbolo povas havi aliajn nuancojn en la hebrea poezio, ekz. stabileco, fideleco kaj protekto, sed la Roko certe estis ligita al patrineco kiel ankaŭ en la ĉirkaŭanta mondo. Ekzemple, en la Hita “Kanto pri Ullikum-mis,” Kumarbis, “la patro de ĉiuj dioj,” estigas heroon per fekundigo de granda roko, rekte nomata kiel patrino dio.

La originala signifo de la dia nomo *Ŝaddaj* ankoraŭ ne estas certa, sed ĝi povas havi konekton kun roka kaj monta konceptoj. Kvankam modernaj interpretoj emas trovi konekton kun la akada vorto *šadu* (monto: kp. la titolon “Granda Mondo” uzata por mesopotamiaj virdioj), la Scofield Reference Bible vidis etimologian ligan kun la hebrea vorto *šad* (mamo):

Ŝaddaj konsekvence signifas, ĉefe, “mamhava”... Same kiel plorema, nekontentigita bebo ne nur ricevas forton kaj nutron de la mamo de la patrino, sed ankaŭ trankviligon, kvietigon, kontentigon, tiel ankaŭ El Ŝaddaj estas la nomo de Dio kiu konigas lin kiel la Forton-donanton kaj Kontentigon de la popolo. Pro tio, estas domaĝe ke oni tradukis “Ŝaddaj” per la vorto “Plej-potenca.” (Noto pri Genezo 17:1.) Nia fadeno povas esti sekvata eĉ en la signifoplena izraela persona nomo Curiŝaddaj (“Ŝaddaj estas mia Roko”), sed la preciza senco de la nomo plu estas necerta. Tamen, tiaj konsideroj devigas ke ni agnosku la androgenajn elementojn en la izraela bildo pri Dio, paralele al la karakterizo pri la lun-dio Sin, en kiu duseksa bildaro estas amasa:

“Utero kiu naskas ĉion...naskinto de la lando...patro, naskiganto de dioj kaj homoj.” Efektive, tamen, la Rok-figuro estas pli klare virseksa en la izraela religia simbolismo: Jahŭe estas la Patro-Kreinto de Izrael, ĝia “Roko de sia Savo”⁷ (Readmono 32:15).

La Saĝeco kiel Dia Virino

En Sentencoj 8, virino aperas kaj parolas al la homoj.

Dio la “Patrino”

Ŝi konigas sin kiel Saĝeco, kaj invitas ke oni akceptu ŝian instruadon kaj tiel trovu vivon kaj feliĉon. En verso 30 ŝi karakterizas sin kiel *'āmōn*, kaj lasas al modernaj lingvistoj konjekti pri la signifo. Multaj kaj diversaj estas la sugestitaj tradukoj por *'-m-n* (plus diversaj vokaloj), sed multaj el ili havas rilaton al nia aktuala temo. Ekzemple, *'ōmēn* estas la vorto uzita por karakterizi Moseon kiel nutristinon por Izrael, kaj ni povas kompari la karakterizon faritan de Philo pri Saĝeco “ĉies nutrintino.” Oni sugestis legi *'immān*, t. e. “ilia patrino.” P. de Boer sugestas formon *'immōn*, titolon de konsilanto, kun esenca signifo “patrin-estro” aŭ “patrineto.”²² Alia iom surpriza sugesto estas derivi la vorton el la akada *ummanu*, “metiisto,” vorto ankaŭ uzita kiel titolo por instruisto en lernejo (“mastro”). La juda Midraŝ pri Genezo 1:1 donas kvar eksplikojn, el kiuj unu estas “pedagogo.”²³

Precize kion celis la aŭtoro de Sentencoj 8 per verso 30 ne estas klare, sed eble ni povas detekti nuancon de patrineco, kun malpli elstara nuanco de edukado.

Certe postaj reprezentoj pri la Saĝeco inkludis ambaŭ elementojn, krom bildon pri knabino svatenda. Tiel en la Saĝeco de Ben Sira:

*Ŝi venos renkonti lin kiel patrino,
Kaj kiel la edzino de la junulo ŝi bonvenigos lin.
Ŝi nutros lin per pano de kompreno... (15.2s.)*

Simile la aŭtoro de la Saĝeco de Salomono esprimas sian amon al Sofia:

*Mi amis ŝin kaj serĉis ŝin ek de juneco,
Kaj mi deziris edzinigi ŝin,
Kaj mi ekamis ŝian belecon.
Ŝi glorigas sian noblan naskiĝon, loĝante kun Dio,
Kaj la Sinjoro de la Universo ŝin amas.
Ĉar ŝi estas inicita en scion pri Dio,
Kaj estas kolego en lia laborado. . . .
Tial mi intencas devigi ŝin loĝi kun mi,
Sciante ke ŝi donos al mi bonan konsiladon.... (8:2s,9).*

Efektive, kelkaj deklaroj en Sentencoj 8 sugestas la samajn

ideojn: Oni evidente karakterizas Saĝecon kiel instruantan patrinon:

Prenu mian instruon, kaj ne arĝenton. ... (8:10)

Mi amas miajn amantojn. ... (8:17)

Kaj nun, infanoj, aŭskultu min. . . . (8:32)

Aŭskultu instruon, kaj saĝiĝu. . . . (8:33)

Nin renkontas la dilemo decidi ĉu temas nur pri tropoj (personigo), aŭ ĉu oni atribuas ian metafizikan ekziston al saĝeco, unu el la karakterizaĵoj de Dio (t.e. hipostatigo).

Ni trovas partojn de Sentencoj 1-9 kie Saĝeco estas persono, ĉarma estrino ĉe bankedo, profetino en la publikaj placoj, sed restas demando ĉu Saĝeco, kiu estas apud Jahŭe (Sentencoj 8:30) estas poezia personigo, aŭ hipostatigo (t.e. mem ekzistanta ulo). Ĝenerale oni opinias ke ni devas vidi iom post iom kreskon, komence kun literatura personigo en Sentencoj, sed finiĝanta kun plejalta personigo, eĉ hipostatigo, en la helena Saĝeco de Salomono kaj la verkoj de Philo el Aleksandrio. Do, en Saĝeco 7-22-26 la multaj atributoj, ekz. sankteco kaj plenpotenco, deklaras ŝian diinecon, kvankam B. Metzger, i.a., opinias ke “la aŭtoro hezitas atribui diecon al Saĝeco, apud kaj ekster Dio mem.”²⁴

Negrave kia estas la vero, oni ja demandas al si kiom tiaj demandoj ja ĝenis la verkinton de Sentencoj. Iukaze, L. H. Brockington subtenas ke ni rigardu Saĝecon kiel intencitan adapton de la konstanta semida kredo pri diaj edzinoj, por nuligi la danĝeron de tiu kredo.²⁵ *Ĥokma* kaj *sofia* estas gramatike inaj, kaj tio eble faciligis la evoluon; ankaŭ kontribuis la bezono trovi ian peranton inter la mondo kaj Dio (kiu konstante iĝis pli transcenda en la vidpunkto juda). Aliaj aspektoj de Dieco, ekz. la dia ĉeesto (*Ŝkina*) aŭ la dia vorto (*Memra, Logos*), estis simile traktataj en la posta juda teologio, palestina kaj helena. W. F. Albright eĉ trovas tian hipostatigon de aspektoj de Jahŭe en la religio de la judoj ĉe Elephantine en Egipto dum la 5a jarcento a.K., kvankam studistoj emas nomi la aperon de Anat Jahu “pagana sinkretismo,” laŭ kiu oni donas al Jahŭe edzinaron, same kiel al la

Dio la "Patrino"

aliaj dioj.

La debato pri hipostatigo daŭras sen vera akordo, krom ke oni agnoskas ke la tasko de tiaj perantoj estas ligi la ĉielon kun la tero. P. de Boer provoke kondamnas la tutan diskuton kiel modernan klopodon eviti "sugesti ideojn heterodoksajn rilate al la dogmo pri la Triunuo."²⁶

La Sankta Spirito kiel Dia Patrino

La Spirito de Dio estas parto de la Triunuo kiu, laŭ de Boer, estas senespera ruzo por blindigi nin pri la multaj Dioj en la Biblio. Negrave kion oni opinias pri tio, oni ja povas rimarki ke en la Saĝeco de Salomono (ekz. 9:17s.), kaj en aliaj verkoj el la intertestamenta periodo, Saĝeco havis komunan edukan rolon kun la Spirito, kaj sekve oni ofte kombinis la du figurojn.

Kiel *hokmā* la substantivo *rūah* estas gramatike ina, kvankam la greka *pneuma* estas neŭtra, kaj oni kutime supozas ke la Spirito estas viro, en Kristanismo, eĉ kvankam samtempe senseksa.

Tamen, en la frua siri-parolanta Eklezio oni ĉiam rigardis la Sanktan Spiriton kiel virinon. En ia epiklezo, en la Agoj de Tomaso, oni alvokas la Spiriton laŭ maniero kiu plenklaŭre pravas tion:

"Venu (ina verbo) Mesaĝisto (virseksa substantivo) de pacigo." Simile, en la sama tradicio, Afraates, "la persa saĝulo de la 4a jarcento, komentas pri Genezo 2:24 tiel:

Kiajn patron kaj patriron viro forlasas kiu aliĝas al edzino? Jen la signifo: kiam viro ankoraŭ ne edziĝis, li amas kaj honoras Dion la Patron, kaj la Sanktan Spiriton, la patriron. (Sermono xviii, 10).

En la fruaj kristanaj himnoj, la Kantoj de Salomono (siria teksto), la koncepto pri virina Spirito, kiu povas doni lakton al homoj, estas prezentata tre groteske (laŭ modernaj emoj) ankaŭ koncerne la Patron kaj la Filon:

La Sinjoro diras "Miajn proprajn mamojn mi preparis por ili, por ke ili trinku mian sanktan lakton kaj tial vivu."

(viii.16). En la juda tradicio, la Toran simbolis lakto, kaj la trinkado de religia scio estis komparata al la trinkado de lakto. Do Kimĥi komentas pri Jesaja 55:1 ("iru, aĉetu vinon kaj lakton"): "Same kiel lakto nutras infanon, tiel la Tora nutras la animon." La saman koncepton havas la Nova Testamento, iomete:

Kiel ĵus naskitaj suĉinfanoj, sopiru al la spirita lakto pura, por ke vi per tio kresku en savon.

(Tiel 1 Petro 2:2; sed komparu 1 Korintanojn 3:2 kaj Hebreojn 5:12s.)

Sed la fruaj patroj de la Eklezio multe vastigis tian bild-paroladon. Denove el la Kantoj:

Taso da lakto estas proponita al mi... La Filo estas la taso kaj la melkito estas ta Patro; kaj la melkinto estas la Sankta Spirito. Kaj la Sankta Spirito malfermis sian mamon kaj enmiksighis la lakton de la du mamoj de la Patro.... (xix. 1-5). Klemento el Aleksandrio kapablis verki tiel, ekz. en Paedagogus i.8: la Dia Vorto, laŭ li, estas "lakto de la Patro, per kiu, sola, beboj ricevas nutron. Per la Vorto ni kredas al Dio, *al kies zorgon-nuligantajn mamoj ni kuris.*" Necesas demandi: ĉu tia koncepto povas havi modernan valoron?

La Patrineco de Dio Hodiaŭ

Konkludante studon pri la diino Aŝera en la religio de Izrael,²⁷ R. Patai esprimas sian opinion ke la adorado al la patrino dio certe donis multan komforton kaj kontentigon al la Izraelidoj. Ekde multaj jarcentoj la romkatolikaj kristanoj jam trovas egalan komforton, dum sia honorado al la nova Reĝino de la Ĉielo. Ĉu la Protestantismo rolas kiel amara Jeremia, denunciante aferon kiu efektive plenumas veran bezonon homan? Kvankam la protestanto ne povas akcepti la opinion ke la honorado al Mario estas nepre necesa por plena maturiĝo en la kristana vivo, laŭ la kredo de katolikoj, tamen ja ekzistas loko por la ina aspekto de la karaktero de Dio en la religia pensado de protestantoj.

Ja "Por ĉio estas sezono, kaj tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno.... Tempo por plori, kaj tempo por ridi; estas tempo por ĝemi, kaj tempo por danci." (Predikanto 3:1,4). Do, kiam Johannes Brahms entreprenis komponi protestantan rekviemon, li amasigis por la teksto ne la vortojn de la rekviema meso sed tekstojn de fido kaj konsoligo el la bibliotraduko farita de Martin Luther. Apud la vortoj de Johano 16: 22, kie Jesuo promesas al siaj disĉiploj la ĝojon kian havas patrino post nasko, Brahms metis la verson el Jesaja 66:13, kiun ni jam rimarkis, "Kiel homon kiun konsolas lia patrino, tiel mi vin konsolos."

Alia afero temas pri la religia edukado al infanoj. La katolika infano povas mildigi la bildon pri severa Dio per la figuro de la Patrino de Dio. Aliflanke, la infano el sendenomina lernejo, al kiu oni diras ke Dio estas kiel patro, nur povas koncepti ulon kiu venas ebrie hejmen je la 6.30 pm., kaj batas lin per vipo. Komprenoble, multmaniere ni povas montri al infanoj la amon kaj kompatemon de Dio la Patro kaj de Jesuo, sed ĉu ni ne diru ankaŭ al ili ke Dio estas kiel Patro *kaj* Patrino?

Lasta konsidero temas pri pastrigo de virinoj. Tiurilate, teologia disputo fariĝas surbaze de la supozita vireco de Dio kaj Kristo. Uzante la lumon faratan de la materialo konsiderata en ĉi tiu studo, ni vidas ke tia argumento ne havas validecon.²⁸

Eĉ se kelkaj ideoj ĉi tie esprimitaj (kiujn ne ĉiujn ja akceptas la verkinto, mi diru!) ŝajnas tre heterodoksaj al la legantoj, tamen predikantoj eble povas trovi en ili pensojn por la predikoj dum Tago de Patrinoj!

Notoj

1. *The Origins and History of Consciousness*, London, 1954, p.54.
2. *The Great Mother, an Analysis of the Archetype*, New York, 1955.

3. *The Archetypes and the Collective Unconscious*, C.W. 9, pt.1, p.75-100.
2. W.F. Albright, *From the Stone Age to Christianity*, New York, 1957, p.233-236.
5. Kp. H. W. Parke and D. Wormell, *The Delphic Oracle*, Oxford, 1956, I, p.3-41.
6. *Prophecy in Ancient Israel*, Oxford, 1962, p.94.
7. Samloke, p.94, 96.
8. P. de Boer, "The Counsellor" en *Wisdom in Israel and the Ancient Near East*, (WIANE), p.42-71, p.59. (Leiden, 1960.)
9. Albright, p.234s.
10. *Ancient Near Eastern Texts* (ANET), p.490.
11. Vidu Lindblom, p.83-95 kaj 105ss. por komparo pri vidantoj kaj profetoj en la antikva Izrael.
12. Kp. Lindblom, p.173-182 pri "la rivela mens-stato."
13. Jung, *Answer to Job*, en C.W.2, p.388.
14. Vidu G. Bostrom, *Proverbiastudien, Die Weisheit und das fremde Weib in Spr. 1-9*, Lund, 1935.
15. A. Parrot, *Samaria the Capital of the Kingdom of Israel*, London, 1958, p.67-70.
16. Vidu G. R. Driver, *Canaanite Myths and Legends*, Edinburgh, 1956, p.37, 123. Plako el Ugarito montras du junulojn mamnutratajn de diino.
17. Citita de Bostrom, p.173.
18. En Juĝistoj 2:13; 10:6; 1 Samuel 7:4; 12:10, ekzemple. La diino Anat estas konata nur per nomoj de lokoj, Bet Anat kaj eble Anatot, la urbo de Jeremia. Vidu Pt. Patai, "The Goddess Asherah" en *Journal of Near Eastern Studies*, XXIV, 1965, p.37-52.
19. Neumann, *Consciousness*, p.74. Kp. G.E. Wright, *An Introduction to Biblical Archaeology*, London, 1960, p.9: "Estas probable ke inter la Kanaanidoj neniam ekzistis akordo pri kiu el la diinoj estas la edzino de Baal."
20. J. B. Pritchard, *Palestinian Figurines in Relation to Certain Goddesses Known Through Literature*, New Haven, 1943.

Dio la "Patrino"

21. *Peake's Commentary* (dua eldono), London, 1962, p.611.
22. De Boer, p.69s.
23. R.B.Y.Scott diskutas la sugestojn en "Wisdom in Creation: "The 'amon of Proverbs VIII 30" en *Vetus Testamentum*, 10, p.213-223.
24. *An Introduction to the Apocrypha*, New York, 1957, p.67.
25. *A Critical Introduction to the Apocrypha*, London, 1961, p.64s. Similan opinion esprimas Bostrom, ekz. p.14.
26. De Boer, *WIANE*, p.42s., kaj 69-71.
27. Vidu numeron 18.
28. L. Hodgson, "Theological Objections to the Ordination of Women," *The Expository Times*, aprilo, 1966, p.210-213.

LA KRISTOLOGIO DE LA PAROLADO DE SANKTA PETRO EN AGOJ 10:34-44

de Nicholas Alldrit

La N.T. prezentas al ni diversajn konceptojn pri la personeco de Jesuo; sed la plej grava por la posta evoluado de la kristana doktrino estas tiu, laŭ kiu Jesuo enkorpiĝis tiun dian principon, kiu estas samtempe la modelo de la Kosmo, la dia menso tie imanenta, kaj ĝia kreinto. Pro tio, ke ĉi tiu doktrino, formulita en la prologo de la 4a Evangelio, estas la bazo de la kredoj akceptitaj de la plimulto de Kristanoj, necesas precize fiksi, kio estis tio, kio “fariĝis karno”, kaj kiel oni povis tion aserti; kaj tiucele necesas iom esplori, kiamaniere tia kredo ekestis en la Eklezio. Malgraŭ la necerteco pri la fontoj de la Johana doktrino, jam evidentiĝis, ke la Logos-doktrino troviĝis ĉe la koro de la teologia sinkretismo de la malfru-helena epoko; kaj oni nun kredas scii, kiel, kaj eĉ de kie, la Eklezio enkondukis ĝin en sian teologion. Sed oni neniam klarigis, kiamaniere ĉi tio efektiviĝis: kiel la homa Mesio povis fine esti identigita kun tiu principo, kiu kuntenas la tutan Universon. Mi kredas, ke la respondon liveros la antaŭa historio de la Logos-doktrino; sed grava indico kuŝas tie, kie ŝajne neniu pensis serĉi, nome en la N.T. mem. Jen tio, kion mi nun volas pritrakti.

Modernaj ekzegezistoj kutime limigas la Kristologion de la Logos al la Johanaĵ verkoj, kaj eble ankaŭ al la Epistolo al la Hebreoj. E. Walden¹ argumentis por la aldonado de la pastoraĵ epistoloj, sen tamen veki multan atenton. La ekleziaĵ Patroj, apenaŭ konsciaj ke la teologio de la N.T. montras evoluadon, trovis Logos-kristologion eĉ en tiuj lokoj, kie “Logos” tutcerte signifas nur la mesaĝon de la Evangelio; kio ebligis al ili refuti diversajn herezojn, kaj al postaj Koncilioj formuli la dogmojn de la kristana ortodokseco.

Trovinte tian lokon ĉe Atanasio, mi decidis ekzameni ĝin en ĝia biblia kunteksto, nome Agoj 10:36, por vidi, ĉu lia ekzegezo estas subtenebla. Komprenoble mi tuj trovis min antaŭ teksta problemo.

Se ni volas reteni la akuzativan relativan pronomon (*hon*), ni devas supozi, ke ĝia antaŭaĵo (*Ton logos*) estas alitrita en la akuzativon per imitado (Atrakcio), kaj ke ĝi estas poste reprenita per la demonstrativo (*houtos*) laŭ la tropo “Epanalepsis” (Kp. 1 Kor. 10:16). Ĝi ne povas esti objekto de *Oidate*, kun *Rēma* en apozicio, ĉar tio signifus nur, ke Dio ekestigis onidiron en Judujo pri ia bonfarado de Jesuo!

Sen *hon*, la vortoj montras sin citaĵo el Ps. 106:20 laŭ LXX. Pro tio, ke *Rēma* povas signifi “sententia scripturae” kaj *gignesthai* “plenumiĝi”, oni povas traduki la finon per “vi konas la sanktan skribaĵon, kiu estas plenumita”, sed mankas paralelaĵo pruvanta, ke tiu frazo signifas ia plenumiĝon de profetaĵo. Estus do pli bone, kaj ne multe malsame, traduki per “Dio sendis sian *Logos* al la Izraelitoj (laŭ la profetaĵo de Ps. 106), kiam li predikis la pacon per Kristo. Ĉi tio estas pruvita de tio, ke Kristo resanigis homojn kaj savis ilin el malfeliĉo — vi scias la historion, kiel li tion faris.”

Sed la diferenco laŭ tio, ĉu ni retenas *hon* aŭ ne, estas pli profunda: kun *hon*, *logos* devas havi la Johanan sencon, ĉar ĝi estas tuj poste nomita “Sinjoro de ĉiuj”, do rilatas Personon. Kion do ĝi signifas, se la forigo de *hon* apartigas ĝin de tiu Persono?

Eĉ se ni akceptas la provojn rilatigi la frazon “Sinjoro de ĉiuj” al Jesuo (ne al ia *Logos*)² provoj motivigitaj de la kredo, ke la *Logos*-teologio ne povas troviĝi ekster la Johanaĵoj, restas la fakto, ke la frazo de LXX *ho logos tou theou* estis jam je la tempo de ci tiu parolado kunligita kun la persono kaj predikado de Jesuo. Tial oni vidas, ke la *Logos*-teologio de la frua Eklezio havis sian bazon en la M. T.

Sed kiel hebrea frazo povis akiri tian grekan signifon? Sendube per tio, ke la Judoj de la Diasporo interpretis sian LXX laŭ la filozofiaj sistemoj de la hebrea mondo, kiu ĉirkaŭis ilin. Flankenlasante Filon, kiu portis ĝis maksimumo la identigon de la biblia kaj la greka *Logoi*, ni vidas en la Saĝeco de Salomono (xvi), ke la Saĝeco (*Sofia*) ricevas la samajn ecojn,

kiel la Logos, nome: esti kreanto, kuracilo de Malbono, punilo de Egiptujo, asesoro de Dio; kaj ĉiuj ĉi lokoj estas inspiritaj de tekstoj en la M. T. Sed ĉi tiu identigo ne estus farita, se la identigo de la stoika kaj la LXX'a Logoi ne estus jam farita antaŭ ol la libro estis verkita, kaj antaŭ ol Petro faris sian paroladon.

Ekzistas tamen plua ligilo inter ĉi tiu ĉapitro de la Saĝeco, Ps. 106:20, kaj la N.T. La kunteksto de la Psalmio montras, ke temas pri la okazaĵoj de *Nombroj* 21:6-9, kiam Dio ordonis al Moseo fabriki kupran serpenton, kiu resanigus la malsanulojn. Estas neklare, kial la Psalmisto nomas la serpenton la vorto de Dio; sed tio ekestigis la kristanan simbolismon, laŭ kiu la serpento sur la standardo estas tipo de Kristo, la enkarniĝinta Logos, sur la kruco. Pri tio pensas la aŭtoro de ia *Saĝeco*, nomante ia serpenton *Symbolon Sōtērias*³. Al tio aludas S-kta Johano (3:14), dirante “kaj kiel Moseo levis la serpenton en la dezerto, tiel devas la Filo de homo esti levita.” Tio povas troviĝi eĉ malantaŭ la postaj vortoj de nia teksto, laŭ kiuj Jesuo “ĉirkaŭiris, bonfarante kaj sanigante ĉiujn premegatajn de la diablo”.

Sed estas atentinde, ke la resanigado farita de la Logos estis paralela al, kaj estas la realaĵo malantaŭ, tiu farita de la kupra serpento. Do la teksto de Agoj ne konsistigas doktrinon pri la enkarniĝo de la Logos. Temas nur pri interligado de la laboro de Jesuo kaj tiu de la Logos. Eĉ kiam la identigo estas kompleta, restis la ideo, ke Jesuo faris en la tempa sfero tion, kion faras la Logos en la eterna. Atestu la prologo al la 4a Evangelio, laŭ kiu la Logos estis en la mondo (nekonata) antaŭ ol enkarniĝi.

Alia signo de ĉi tiu *asociado* kun la Logos troviĝas en Hebr. 2:10, kiu enhavas la stoikan formulon apartenantan al la Logos kaj aljuĝitan al Kristo kiel ĉe la Epistolo de Paŭlo al la Koloseanoj (1:16-17).⁴ W.L.Knox nomas ĉi tiun Kristologion tiu “de la dia Heroo”, laŭ kiu Jesuo, same kiel Herakleso kaj aliaj “diaj homoj” atingis perfektecon pere de suferado. Pro tio, ke la sekvantoj de Jesuo savas sin imitante lian ekzemplon, Li estas nomita la “Kondukanto” (arhēgos) de ilia savado, same kiel Epikteto kaj Seneko nomas Herakleson

arĥēgos Pasēs Sōtērias.⁵ Ĉi tiu vorto *arĥēgos* estas kristologie uzita en la N. T. nur en Agoj 3:15 kaj 5:31 kaj en Hebreoj; kaj ambaŭ lokoj en Agoj apartenas al paroladoj de Petro.⁶

Ŝajnas do deduktebla afero, ke la teologio de la paroladoj de Petro en Agoj reprezentas fazon mezan inter la Kristologio de la Mesio kaj tiu de la Enkarniĝo; t.e., ke laŭ ĝi Jesuo, kiel Heroo kaj Savanto, efektivigis la laboron de la Logos sur la tero dank' al tio, ke la Logos agis en kaj per Li, same kiel Ĝi estis aginta en kaj per la kupra serpento. Pro tio, ke tiamaniere Jesuo fariĝis homo, kiu povis lerni pere de suferado kaj fariĝi perfekta, tiu ĉi teologio konfliktas kun tiu de la Enkarniĝo, laŭ kiu Jesuo estis perfekta ekde la naskiĝo. Ĝuste ĉi tiu lasta estis jam fariĝinta la akceptita Kristologio, kiam Luko verkis siajn du volumojn (Kp. Luko 1:2 kaj Agoj 13:26); kaj estas des pli interese, ke en la paroladoj de Petro, kiel Luko ilin registris, oni ekaŭdas pli fruan fazon de la Kristologio. Estas logike, ke tiel kompleksa ideo nur iom-post-iom evoluis, kaj estus suspektinde, se tiu evoluado ne respeguliĝus en la evangelia rakonto. Sed tiu fideleco al la historia vero ebligis al herezuloj apelacii al Agoj 10:36 por apogi sian tezon, ke la Filo kaj la Logos estis malsamaj⁷.

Notoj

1. J.T.S.xxiv, p.310.
2. Kirksopp Lake kaj Foakes Jackson, *The Beginnings of Christianity*, Vol.3.
3. Kp. mezepokan himnon, kiu parafrizas Saĝecon 16:12-13 jene:
“Kupra serpento sur stango, Serpento iam resanigis homojn, rebonigis la venenan pikon: Orfeo nova, li sentime forportis sian novedzinon el la Infero.”
4. Norden, *Agnosios Theos*.
5. Epiktet. Diss. 3,26,32; Sen. de Benefic. 4,8; kp.M.Simon, *Hercule et Christianisme*, ĉ.3
6. W.L.Knox, *Acts*, p.79, kaj *Hellenistic Elements in primitive Christianity*, p.26.
7. Atanasio, *Adversus Arianos* 4,30.

PRI MITOJ EN LA BIBLIO

de Donald Broadribb

Traktante ĉi tiun temon, mi antagonisme vekas la spiton de multaj legantoj, por kiuj la vorto “mito” estas termino forgesenda. Tamen, mi deziras savi ĉi tiun tre utilan vorton el morto malhonora, ĉar ĝi reprezentas koncepton eksterordinare utilan por religiaj studoj, malgraŭ sia misuzo kaj miskompreno fare de kelkaj personoj. Kiel pluraj konceptoj, “mito” estas koncepto adoptita de multaj kontraŭreligiuloj, per kiu batali kaj bati la neplaĉantan religian etoson. Konsekvence, same kiel “evoluo”, “mito” ricevis malhonoron inter religiuloj, kaj nur nun iom post iom komencas montri sian valoron.

Mito estas dramforma prezento pri ekzistenciale sentata situacio. Se vi volas, la sola diferenco inter mito kaj parabolo, ekz. la parabolo pri la neobeema filo, pri kiu rakontis Jesuo, estas ke parabolon diris iu individua instruanto, dum mito estas rakonto kies origino estas nekonata, kaj kiun oni ripetas pro ĝia valoro mem. Mito esprimas veron pri la vivo, pri ekzisto, pri la rilato inter la homo kaj Dio. Sed, ĉar plejofte niaj mitoj venas el antikvaj epokoj, kaj la vivo (aŭ nia percepto pri la vivo) multe ŝanĝiĝis intertempe, tial ni ne plu rekonas ilin. Ili havas strangan, absurdan aspekton.

Oni ne povas pli profunde miskompreni miton, ol kiam oni laŭvorte legas ĝin kvazaŭ historian raporton. Oni devas legi miton (pli bone, aŭskulti ĝin) kvazaŭ dramon. Kiam dramaturgo prezentas al ni sian dramon, li enscenigas ĝin ne por kredigi al ni ke ni vidas verajn eventojn kaj personojn, sed por prezenti al ni ideon. Pli precize, por prezenti al ni vidpunkton aŭ komprenon, “Weltanschauung.” *Faŭsto*, de Goethe, ne estas biografio pri vivinta persono, nek historio, sed klopodo paroli pri la temoj kaj inklinoj de la vivo, bildigitaj per specifa figuro: Faŭsto; kaj pri la influoj kiuj afliktas nin, bildigitaj per Mefistofelo (en la unua parto) kaj aliaj diaj figuroj (en la dua parto). Faŭsto estas literatura mito. *Mito estas drama prezento pri vivrealaj temoj.*

En la moderna epoko, neniuj plu serioze proponas ke ni laŭvorte supozu ĉion en la Biblio kiel historie realan. Ni scias ke, per tio, ni facile perdas la sencon intencitan. Ekzemple: se iu volus trovi la nomon de la Samariano, pri kiu en parabolo parolis Jesuo, en genealogia listo; aŭ per mapo signi la lokon kie tiu haltis por helpi la vunditon — tiu perdis sian tempon per sia absurda serĉado. Ĉar ni scias ke Jesuo ne celis edifin nin per biografio pri iu Samariano. Li volis diri: la “vundito” estas simbolo por iu ajn homo; la “Samariano” estas simbolo por la karaktero, kiun vi mem devas havi. En la Malnova Testamento ni ankaŭ trovas famajn parabolojn, ekzemple: kiam David adultis kun Bat-Ŝeba, kaj poste mortigis ŝian edzon Urija (por ke li ne sciu ke Bat-Ŝeba gravediĝis dum lia foresto), Natan prezentis al David parabolon, por kritiki lin. En la parabolo, li parolis pri malriĉulo, kiu havis nur unu ŝafon; kaj riĉulo, kiu havis multajn. La riĉulo ne volis uzi unu el siaj propraj ŝafoj por prepari festenon, do li perforte prenis la ŝafon de la malriĉulo. David koleris pri la rakonto, ĉar li konsciis pri la maljusteco de la riĉulo. Sed Natan simple diris al li: vi mem estas ja la riĉulo. La rakonto estas nur parabolo pri via propra agado.

El ĉi tio ni povas vidi ke la drameca rakonto havas specialan celon: ĝi montras al ni ion kaŝitan, kion ni ne klare komprenis antaŭe, aŭ kion ni ne volis konfesi al ni mem. En ĉiuj religioj ni trovas similan paroladon, uzadon de rakontoj por sciigi al la aŭskultantoj veron, kiun ili aŭ ne akceptus sen tia preparo, aŭ kiun ili ne konsciis antaŭe. Kiel dirite, niaj vivoj tiom ŝanĝiĝis dum la pasintaj kelkmil jaroj, ke ni ofte ne plu komprenas la celon de la rakontoj. Ekzemple, jen “mito” el Egiptujo, la plej fama kaj grava en la egipta religio antikva:

Osiro estis la fondinto de kulturo. Li estis la granda Dio, filo de la Tero mem, doninta al la homaro civilizacion. Lia fratino estis ankaŭ lia edzino, Iso; lia frato estis Seto. Nu, Osiro kaj Seto disputis, kaj dum la disputo, Seto batis kaj mortigis sian fraton. Por mortigi lin, li metis lin en keston,

kaj ĵetis la keston en la riveron. Osiro sekve dronis.

Iso komencis serĉe sian frat-edzon, kaj trovis la keston en kiu estis la kadavro de Osiro: ĝi estis en la koto sur la marbordo de Palestino. Jam longe ĝi restis tie, kaj la ligna kesto dum la intervalo fariĝis arbo. La reĝo de la regiono admiris la arbon, distranĉis ĝin, kaj el la ligno faris kolonon por sia palaco. Iso do trovis la kolonon, en kiu plu estis la kadavro de Osiro. Ŝi akiris ĝin de la reĝo, malfermis ĝin, kaj elprenis la kadavron.

Sed Seto koleris pri tio. Li sekrete prenis la korpon de Osiro, kaj distranĉis ĝin. Poste li disĵetis la pecojn tra la tuta lando egipta. Iso devis rekomenci serĉadon. Si komencis trairi la landon, kolektante pecojn de la korpo. Fine ŝi kolektis ĉiujn pecojn, kun unu escepto: la peniso. Ŝi devis fari lignan penison, kaj ligi ĝin al la korpo. Post tio, ŝi sukcesis mallonge revivigi Osiron, sufiĉe longe por koiti kun li. Farinte tion, li remortis kaj eniris la spiritan mondon. Iso gravediĝis, kaj post kelka tempo naskis filon.

La filo estis Horo. Horo kreskis, dediĉis sin al unusola tasko: venĝi la murdon de la patro per mortigo de Seto. Li sukcesis fari tion. Li mortigis Seton, kaj tiel venĝis la morton de la patro. Li post tio edziĝis kun sia patrino, kaj suriris la tronon de sia patro kiel Reĝo de la mondo.

Ĉi tiu, unuavide obscena rakonto (sed ne pli obscena ol multaj rakontoj en la Biblio) estas interpretenda en la lumo ne de nia propra kulturo, sed de la kulturo en kiu oni rakontis ĝin. Estus granda eraro, ignori la kulturan “kuntekston” de tia rakonto, ĉar ĝi estis religie centra dogmo de la tuta egipta civilizacio. Ni, do, por kompreni komencu rigardi kelkajn kunrilatajn faktojn.

Laŭ la kredo de la egiptanoj, la egipta reĝo mem estas la surtera enkarnigo de la dio Horo. Sekve lia propra patrino devus esti Iso, sed efektive ni trovas, ke ne ŝi sed la trono sur kiu li sidas estas Iso. Lia propra patro devus esti Osiro, kaj ni trovas ke, efektive, tiel estas: lia mortinta patro estas

Osiro. Sed nun ni renkontas strangaĵon: la persono *iĝas* Horo, kiam lia patro mortis kaj li nun surtroniĝas. Do: ĉiu reganta reĝo estas Horo. Kiam reĝo mortas, li iĝas Osiro, kaj lia filo nun iĝas Horo. Tio okazas kiam la filo “edziĝas kun Iso” t.e. surtroniĝas, ĉar Iso ja estas la trono.

Ĝis nun, bone, eĉ se strange. Sed ni rigardu plu. La reĝa spirito fariĝas senmorta, kiam la reĝo mortas. T.e., lia spirito eniras la ĉielon, kaj partoprenas la regnon de la eternaj steloj. Sed en la reĝo ekzistas pli ol nur persona spirito. Ekzistas ia potenco konkreta, kiun oni nomis lia *Ka*. Tiu *Ka* estas la reĝa karaktero, konkreta dia animo kiu estas la esenco de Horo. Kiam la reĝo mortas, lia *Ka* transiras al lia filo, kiu nun fariĝas Horo. Kaj ĉar la mortinta patro ne plu havas sian Horo-*Ka*-n, li ne plu estas Horo, sed fariĝas la mortinta Dio, t.e. Osiro.

Ĝuste kiam ni kredas kompreni tion, ni renkontas novan problemon. La reĝo, en si mem, estas Horo (eventuale Osiro), sed ankaŭ aliaj personoj povas fariĝi Osiro. T.e., persono kiu ja ne estas egipta reĝo povas, en la religia rito, unuiĝi kun la *Ka* kiu estas Horo, kaj kiam la persono mortas, lia spirito ankaŭ “Osiriĝas.” (Tiel ke, post kelkaj jarcentoj, “Osiriĝi” estis populara eŭfemismo, anstataŭ la vorto “morti.”) Do la Horo-Osiro-mito aplikeblas ne nur al la reĝo, sed, *modifite*, ankaŭ al aliaj personoj.

Kelkajn aliajn aspektojn ni devas atenti. Estis kutimo, inter la nobelaro egipta, ke viro edzinigas sian propran frat-inon; kaj efektive okazis, senhonte, ke viro edzinigas sian propran filinon. Sekve, eventoj en la mito ne estas tute fremdaj al la ĉiutaga vivo.

Kial, do oni rakontadis tiun strangan noveleton? Kaj, pli grave, kial oni ne nur kredis ĝin, sed faris ĝin la centra kredo de la religio kaj, pro ĝia aludo al la egipta reĝo, ankaŭ de la socio? Kiam oni vortlegas ĝin, ĝi havas malmultan sencon. Sed, anstataŭe, se oni imagas *vidi* ĝin, kvazaŭ dramon — aŭ, pli bone, kvazaŭ songon — la senco komencas alflui. Ĉar

oni ne anticipas ke oni devas laŭvorte kompreni dramon aŭ sonĝon. Oni komprenas ke tion oni devas kompreni simbole. T.e., kiel en la paraboloj, la rakonto bildigas koncepton aŭ ideon. Sed kiun ideon?

Ni mem, nuntempe, malfacile vidas la koncepton, ĉar ni ja estas kristanoj (aŭ judoj). Tio estas, ni jam havas propran religian konceptaron, kaj ĉio alia ŝajnas akcesora aŭ distra. *Por kompreni la egiptan religion, ni devas plene forgesi nian propran.* Helpas nin fari tion, se ni pensas pri la centraj faktoj en nia kristana religio, por ke ni povu ilin forgesi aŭ ignori. Evidente, la centra fakto estas Kristo mem, kaj kion Kristo signifas. Se ni forviŝas tion, kompletan, el nia memoro, ni subite ekvidas la koncepton de la Osir-Hora mito.

Nome, la mito parolas, evidente, pri postmorta vivo. Kaj, egale evidente, ankaŭ pri la surtera vivo. La mito enhavas du karakterojn, kiel ni vidis: unuaflanke, ĝi parolas pri spiritoj kaj morto; sed aliflanke, ĝi parolas ankaŭ pri la surtera reĝo, surtroniĝo, edziĝo kun la propraj fratino kaj patrino, krome, venĝo surtera de la patromurdo.

La mito havas malgrandan similon kun alia fama mito antikva, ĉifoje el Grekujo, nome Ojdipo. (Edipo, laŭ alia transliterumo.) Ojdipo ankaŭ edzinigis sian patrinon. Sed kelkaj gravaj diferencoj ekzistas: Ojdipo mortigis, senintence, sian patron. Seto mortigis sian fraton, kaj la filo de Osiro venĝis tiun morton. Ojdipo, trovinte sian agon, ekpentas, sin blindigas, kaj klopodas iel perdi sin, pro honto. Seto mem, siavice, mortas, kaj la celo de la mito klare estas io dezirinda. Sed alia similo ekzistas: ambaŭ rakontoj temas pri reĝoj, kaj ambaŭkaze la “reĝo” estas nur figuro kiu kaŝas la rigardanton/kredanton mem.

Ni reprenu la Osiran rakonton, kaj faru al ni du demandojn:

1. kie en la vivo io simila okazas, aŭ devus okazi?
2. kie en la morto io simila okazas, aŭ devus okazi?

Ni devas fari tiujn demandojn, ĉar estas klare ke oni prezentis

la miton kiel paradigmon, kiel dezirindan eventon, al la kredantoj. Kaj ni devas memori ke nia respondo devas konformi al la etapo de la egiptanoj, kaj ne de ni mem kiuj havas kristanan aŭ judan historion.

Ni bonorde traktu la du demandojn.

1. Kie en la vivo io simila okazas, aŭ devus okazi? Nome, ke la patro mortas, la filo kreskas kaj anstataŭas sian patron, *venĝas ties morton*, kaj unuiĝas kun sia fratino/patrino. Mi atentigis pri la frazo “venĝas ties morton,” ĉar precize tie ni trovas distingon kontraŭ la Ojdipa mito, kaj neniu eksplikoj kontentigos kiu ne inkluzivus tiun fakton.

Evidente tia agado kutime ne okazas dum la ordinara vivo, se ni laŭvorte konsideras ĝin. Sed se ni konsideras, unue, ke la vivdaŭro de homoj dum la antikva epoko estis multe malpli longa ol nia, pro la abundo de malsanoj, akcidentoj, milito, ke., evidentiĝas ke ofte efektive onia patro ja mortis antaŭ ol oni multe kreskis. Kaj due, ke la efekto de plena incesto estus genetike “eternigi” la gepatrojn. Venĝi la morton de la patro = meti sin en ties pozicion, transpreni la vivon kaj agadon liajn, konsideri liajn malamikojn la proprajn malamikojn, kc. La filo efektive, dum sia vivo, devas anstataŭi sian patron; speciale en la antikva socio. La egiptanoj mem ofte ja edziĝis kun siaj fratinoj, foje la patrinoj ankaŭ, do ni ne povas nomi tiun parton de la mito fantazio. Ĝi estis idealo, celo, efektive praktikata nur de la nobeluloj kaj altranguloj, por la individua homo. Kiel dirite, la efekto de tia incesto estus daŭrigi la vivon de la gepatroj, almenaŭ genetike. Do la suma senco de la rakonto, en la aktuala vivo, estus: la filo nun anstataŭas la patron, kaj daŭrigas lian vivon per la propra vivo kaj per siaj idoj.

2. Kie en la morto io simila okazas, aŭ devus okazi? Per ĉi tiu demando ni eniras la religian konceptaron. Ĝuste la fakto ke Dio mem “mortis” kaj “reviviĝis” estas la respondo. Sed tiu respondo estas iom erariga. Osiro estas la eterne “morta” Dio. Sed kion signifas la “morto de Dio”? Tio estas

logika absurdaĵo, ĉar Dio estas senmorta — ankaŭ en Egiptujo. Anstataŭ forĵeti la rakonton kiel absurdaĵon, tamen, ni klopodu trovi la kernon de aŭtentikeco en ĝi. Ni faras tion, kiam ni demandas al ni: precize kion signifis por la personoj en tiu epoko la vorto “morto”? Ni trovas ke laŭ ili, morto estas eniro en ia spiritan mondon. Ili konceptis la spiritan mondon tre konkrete: nome, ĝi estas la stela mondo. La steloj estas eternaj, ili movas sin en la ĉielo. La spirito de mortinto suprenflugas kaj eniras la grupon de steloj, kiuj ja estas la spiritoj de aliaj mortintoj. Do la spirita mondo estas konkreta kaj plena reala.

Sekve, diri ke Osiro estas eterne “morta Dio” signifas nur ke li estas plene kaj eterne spirito. Per bilda parolo ili diris nur tion, kion diris Johano per la deklaro “Dio estas Spirito.”

Sed Horo, la filo de Dio (Osiro), vivas surtere; li estas konkreta, vivanta homo. Kiam li mortas, lia dia spirito supreniras kaj unuiĝas kun Osiro. Estas klare, ke la esenco de tiu vidpunkto ne estas tre malproksima de la kristana teologia vidpunkto, kvankam kompreneble ĝi estas ja diferenca. La individua reĝo estas la enkarniĝo de Horo. Sed ne, tio ankaŭ estas tro facila interpreto. En Egiptujo, la “Reĝo” ne estis homo, sed Dio. Tio estas, la “Reĝo” mem neniam ekzistis, sed nur personoj kiuj en si havis la karakteron de reĝado. Por la Egiptanoj, la “Reĝo” estis abstrakta koncepto, kaj la statuojn kaj bildojn pri “La Reĝo” oni faris ĉiam similaj. (Kun kelkaj esceptoj historie tre gravaj, oni neniam faris la bildojn kaj statuojn laŭ la aspekto de la aktuala reĝo; sekve, la statuoj de ĉiuj reĝoj estas preskaŭ identaj.) La efektiva, aktuala reĝo estas nur la reprezentanto de la abstrakte konceptata Reĝo.

Ĉu nun ni povas kuntiri la diversajn aspektojn de la mito? Jes, ĉar ni scias ke la mito rolis ne nur kiel la centra socia kult-mito, t.e. ne temis nur pri la reĝo, sed ĉio estis aplikata al la ordinara homo ankaŭ. Dum la roma imperio, ekzemple,

la “misteroj” de Iso estis tre populara kaj konata religio. Dio estas en la ĉielo. Eĉ ne plu ekzistas tera reĝo. Sed la individua persono povas identigi sin kun, aŭ kombini sin kun, Horo kaj kiam oni mortas, onia spirito eniras la ĉielon kaj “osiriĝas,” t.e. unuiĝas kun Dio. La unuiĝo ne estas la unuiĝo de mistikismo, t.e. fandiĝo de Dio kaj la homo, sed la unuiĝo konata en kristana teologio, t.e. partopreno en la ĉiela glorio dia.

Ni vidas, do, ke la centra kult-mito egipta efektive rolis proksimume same kiel la dogmoj pri Kristo en la kristana religio. Oni povas diversamane koncepti tion. Oni povas konkludi ke kaj la egiptanoj kaj la kristanoj formis similajn mitojn por esprimi la saman aferon. Aŭ, kun Mircea Eliade, oni povas konkludi ke la egipta (kaj aliaj) mito anticipis la manifestiĝon de la enkarniĝo de Kristo, kvankam neklare. Mi preferas ne, ĉiloke, montri preferon pri unu aŭ la alia interpreto.

Sed nun ni reiru al la Biblio. Mi ilustris du faktojn: 1) ke mito estas parabola rakontado; 2) ke por kompreni miton oni devas rigardi ĝin kvazaŭ dramon. Disputoj pri mitoj en la Biblio okazis (kaj okazas) ĉefe pro du kaŭzoj: 1) la vorto “mito” plu estas miskomprenata de multaj personoj; kaj 2) kvankam oni agnoskas la uzadon de paraboloj en la Biblio, tradicie oni emis supozoj “historiaj” multaj aferoj kiuj en la religio de aliaj popoloj nepre ŝajnas “mitaj.” Sed tria kaŭzo, eĉ pli grava, estas ke kristanoj kaj judoj malemas akcepti la fakton ke la homoj de aliaj religioj vere estas homoj. Ĉiu popolo emas supozoj ke ĉiu alia popolo estas iel malpli homa. Sekve, la kristano preskaŭ instinkte malrespektas la religiajn kredojn de ĉiu alia grupo. Tiu malrespekto estas relative nova. Dum la fruaj jarcentoj de la kristanismo, la “patroj” de la eklezio akceptis kaj uzis la religiajn dirojn de aliaj grupoj, ĉar ili opiniis ke Dio estas Dio de la tuta tero, kaj “neniam lasis sin sen atesto.” La ŝovinismo de la postaj kristanoj forviŝis tiun vidpunkton, tiel ke nuntempe eĉ ekzistas malgrandaj sektoj kristanaj kiuj insistas ke nur ilia malgranda grupo

estos “savata.”

Mi deziras listi kaj rigardi, kun vi, kelkajn el la plej interesaj mitoj en la Biblio. Ĉi tiu listo neniel estas plena kaj kompleta. Mi faras ne nur liston sed ankaŭ diskuton, ĉar plejofte oni ankoraŭ ne komprenas la mitojn.

1. la fiŝo kaj la “profeto” Jona.
2. la inundo kaj Noa.
3. la marŝado de Petro sur la akvo.
4. la transformiĝo de akvo en vinon, farita de Jesuo.
5. la naskiĝo de Jesuo.
6. la supreniro de Jesuo.

1) la fiŝo kaj la “profeto” Jona

Ĉi tiu mito estas “libro” en la Malnova Testamento. La dato de la verko estas proksimume 200 a.K. eble iom post tiu dato. Laŭ la rakonto, Jahŭe parolas al Jona kaj ordonas ke li iru al la urbo Nineve (en Mesopotamio) kaj tie prediku. Jona ribele eniras ŝipon irontan al Tarŝiŝ en Hispanujo. Dum la vojaĝo, Jahŭe kaŭzas ŝtormon kaj la ŝipo komencas subakviĝi. Per loto la ŝipanoj trovas ke la kaŭzo de la katastrofo estas Jona. Ili ĵetas Jonan en la maron. Jahŭe “pretigas” grandan fiŝon, kiu englutas Jonan. Dum 3 tagoj kaj noktoj Jona estas en la fiŝo. Post tio, la fiŝo elvomas Jonan sur la teron. Jonan nun iras al Nineve, sukcese predikas, tiel ke la urbo pentas kaj Jahŭe nuligas sian planon detrui ĝin. Jona admonas Jahŭen pro tio, kaj Jahŭe kreskigas hederon (planton) kiu ombrumas Jonan. Poste li nuligas la hederon, kaj Jona suferas pro la sunbrilado. Jahŭe informas al Jona ke la hedero estas parabolo: Jona domaĝas la perdon de mizera planto, do Jahŭe certe rajtas domaĝi la perdon de granda urbo.

Studante miton, estas dezirinde rigardi la motivojn kiuj similas en ĝi kaj aliaj mitoj. Ni unue rimarkas la 3 tagojn kaj noktojn. Poste en la Biblio, ni vidas novan miton, ke Jesuo 3 tagojn kaj noktojn estis en la “infero.” Ekster la Biblio, ni

trovas la saman aferon aliloke. Ekzemple, Iŝtar (Inanna) restas 3 tagojn kaj noktojn en la infero, antaŭ ol releviĝi. (Ŝia releviĝo donas releviĝon en la ĉielon ankaŭ al la spiritoj de “bonaj” mortintoj.) Tiu babilonia (antaŭe, sumera) rakonto, el kiu tekstoj skribitaj ĉ. 1800 a.K. haveblas, konfirmas por ni la popularecon de la 3-taga motivo. Efektive, ni trovas la motivon preskaŭ universale, kaj probable ĝin unue sugestis la luna malapero dum 3 tagoj inter sia “morto” kaj “naskiĝo” ĉiumonate.

La heroo glutita de fiŝo estas egale populara temo. Inter alie, mi nur menciu la faman porinfanan romanon Pinokjo. La transmara vojaĝo, kiu finiĝas pro la engluto farata de mar-monstro, estas familiara al ni el multaj kulturoj. Ekzemple, en Egipto la suno transiras la ĉielon ĉiutage en sia boato, sed vespere ĝin englutas la serpenta monstro kiu loĝas en la prakva abismo.

Sed kion signifas la mito? Ĉar ĝi estas varianto de populara mita serio, estas facile por ni kompreni ĝin. Por kio servis la enfiŝa gluto en Pinokjo? La esenco de la pinokja rakonto estas ke la heroo vere homiĝas, post multaj problemoj. Ĝi estas parabolo. En Egipto, la suno samtempe estis la surtera reĝo, sed estis ankaŭ Dio mem. Oni, la reĝo, eĉ Dio mortas, sed venkas la glutinton kaj nove vivas. Same en la kristana mito, Jesuo mortas, venkas la mortpotencon, kaj reviviĝas. Sed ni scias ke, historie, la rakonto pri Jona havis iom alian karakteron. Nome, ĝi estis uzata por pruvi kial judismo devas prediki al aliaj nacioj (tial Nineve, neniel hebrea urbo). Jona estis parabola bildo pri Judismo mem. Judismo devis morti, kaj reviviĝi kun nova misio. (Kristano probable vidus en tio anticipon pri la “morto de judismo” kaj ĝia nova vivo kun nova formo, kristanismo.)

2) la Inundo kaj Noa

Denove, preskaŭ universala mito trovebla en diversaj epokoj kaj ĉiuj geografiaj regionoj. La detaloj varias, kompreneble, sed la esenco restas: Jahŭe koleras pri la homoj, kies

misagado estas ne plu tolerebla. Li decidis detruĝi ĉion, la tutan teron, per sendo de la originalaj akvoj. (Tiu fakto estas iom kaŝita en la tradukoj, kie perdiĝas la unika terminaro de Genezo 1 kaj la inund-rakonto.) Sed unu familion li decidis savi. La familio konstruas boaton, enprenas bestojn. La inundo venas kaj foriras. La boato restas sendifekta. La familio rekomencas la civilizacion. Dio lasas signon pri si en la ĉielarko.

Klare, ĉi tiu mito intime rilatas al la antaŭa: la surmara vojaĝo inter morto kaj vivo. (Sed mankas la engluto kc.) En la Gilgameŝ-Eposo de Babilonio ni vidas la saman rakonton. Sed pli interese ni vidas ankaŭ varianton de la rakonto: Gilgameŝ mem, en boato, transiras la “akvojn de morto” de la homa tero al la tero kie Utnapiŝtim loĝas. Familiara al ni estas la tre konata koncepto ke post la morto onia spirito devas per ŝipo transiri la akvon al la alia mondo. Ne nur Dante, sed ankaŭ la egipta religio inkludis tion, kaj, denove, preskaŭ ĉiuj religioj havas similan koncepton. (Arketipa bildo.)

Kio plej gravas ĉi-teme estas ke neeviteble la rakonto estas ĉiam ligita al la aŭskultanto mem. T.e. en la Biblio, la rakonto pri la inundo estas parto de zorge farita rakontaro kulminanta per la establiĝo de la juda nacio, parto de la “sav-historio.” La aŭskultanto mem estas ido de Noa, la transmara iro estas lia propra iro. Same en aliaj kulturoj. Sed ni ne bezonas serĉi kultojn por trovi la temon. Jam en nia propra vivo — eĉ en mia, la transira vojaĝo for de malnova vivo al nova vivo estas familiara. Ameriko kaj Aŭstralazio fondiĝis kaj plu kreskas precize pro la fakto ke milionoj da homoj nuntempe *vivas* la miton kaj aplikas ĝin al si mem.

La “inundo” do estas la “inundo” kiu faras la malnovan vivon neebla. La rakonto estas pri la renovigo de la vivo, “renaskiĝo,” se oni volas. En la kristana ritario, bapto plu rolas tiel, kaj konservas por ni ankoraŭ alimaniere la saman motigon.

En mitoj 1 kaj 2 ni do vidas, bildforme, du el la plej centraj

konceptoj de la religio, du el la plej gravaj taskoj de la religio, de ĉiu religio: doni novan vivon jam nun al la partoprenanto, kaj certigi novan vivon post la morto.

3) *la marŝado de Petro sur la akvo*

Ĉi tiu mito, rakontita en ĉiuj kvar evangelioj, estas nun facile komprenebla. Ĝi estas varianto de la sama temo kiel 1) kaj 2), kun kelkaj novaj nuancoj atentindaj. La plej grava nuanco diferenca estas ke Petro sukcesas marŝi sur la akvo nur per la helpo de Jesuo. Tio estas, la rakonto simbole diras ke la renaskiĝo, la transiro al nova vivo, eblas nur per ekstera helpo. Alia rakonto, kun simila simbolismo, estas tiu laŭ kiu ŝipo, boateto, preskaŭ subakviĝas pro ŝtormo; sed Jesuo admonas la ŝtormon, kio ĉesigas ĝin, kaj la boato sukcese transiras la akvon. “Transiri la akvon” estas la frazo uzata konstante en la ĉina religia klasika libro *I Ĉing* por esprimi “venki siajn problemojn.”

4) *La transformiĝo de akvo en vinon.*

Ĉi tiu mito havas iom alian karakteron. Necesas memori ke la greka kulto al Dioniso inkludis “miraklan” transformon de akvo en vinon, en sia ritaro. La evangelio laŭ Johano, en kiu aperas la prijesua rakonto, estas malfrue verkita (inter 100 kaj 150 p.K.), kiam la centro de kristanismo estis en grek-lingvaj teritorioj. La “miraklo” dionisa fariĝis mekanike, en la rito. (En akvotubon oni komencis verŝi vinon, tiel ke iom post iom la elfluaĵo “viniĝis.”) Do unu celo de la mito pri Jesuo estis pruvi lin egala al la pagana dio.

Sed kial akvon kaj vinon oni manipulis? Akvo tiam, kiel multloke nun, ne estis trinkebla fluidaĵo, pro sia malpureco. Oni bone konis la rilaton inter trinko de malpura akvo kaj malsano, en tiu epoko. Vino estis (krom biero) preskaŭ la sola trinkaĵo, kaj estis la normala trinkaĵo amase konsumita. Krome, vino povas ebriigi (se trinkata grandkvante), kaj la ekstazio rezultanta el ebriiĝo povas simili la ekstazon religian. Konverti akvon en vinon signifas ŝanĝi la koruptan mondon en nutran (anime nutran). Laŭ la rakonto, la transformo

okazis dum geedziĝo, kaj ni devas memori la gnostikan emfazon pri “spirita geedziĝo,” t.e. eviton de seksrilatoj por “spiritigi” la kunvivadon de la geedzoj. (Kp. en la *Agoj de Tomaso*.) La gnostika influo sur la evangelio laŭ Johano estas jam bone agnoskita.

Sed, aldone, en la eŭkaristia rito, vino kaj pano fariĝas Kristo mem, kaj en la evangelio laŭ Johano, Kristo emfazas plurloke sian identecon kun pano. Tio devus ne surprizi nin, ĉar la mortanta-kaj-releviĝanta dio en ĉiu el la antikvaj religioj enkarnigis la spiriton de greno; kaj fama estas la azteka rito en kiu oni manĝas panforman dion. Ke li emfazas la vivon ankaŭ ne mirigas. Vino kaj pano estis la ĉefmanĝaĵoj en la antikva mondo. Do la transformo de akvo en vinon signifas ke “Kristo estas la vino de la vivo” kaj ne nur la “pano.”

5) la naskiĝo de Jesuo

Kiel la legantoj scias, du mitoj pri la naskiĝo de Jesuo legeblas en la Biblio, en la evangelioj de Mateo kaj Luko. En la matea, ni havas la tradician “miton pri la naskiĝo de la heroo.” T.e., la infano mirakle naskiĝas (patrino homa, patro dia), oni klopodas mortigi lin, li estas sekrete transprenata al alia loko (Egiptujo), poste revenas kaj iĝas savanto. Aldonita al la mito estas astrologia nuanco: Mateo klopodas ligi la naskiĝon kun la astrologia fenomeno de 7 a.K. (Vidu “Nelonga noto: la datoj de Jesuo” en *B.R.5*, p.73-75.). La astrologia fenomeno mem, kompreneble, estis imaga, ĉar la enhavo de astrologio estas plene fantazia. (La diversaj pozicioj de astroj, en astrologia kalkulado, estas tute ne la realaj pozicioj de la astroj en la ĉielo.) Ankoraŭ por ni, “nova stelo” signifas “eksterordinara evento.” (“Meti novan stelon en sian horizonton” signifas ekakiri novan celon por la vivo.) La valoro de la rakonto ne estas nur honori aŭ speciale emfazi la gravecon de Jesuo—tio jam ne estis bezonata. Sed ĉar “Kristo naskiĝas en vi,” ĝi estas parabola rakonto pri la fakto ke en homa koro (simbolata per Mario, la homa virino) mirakle (t.e. spirite, per ago de Dio) Kristo povas aperi. Lahoma naturo-

klopodas detrui lin, sed fine li venkas. La temon plene elverkis Paŭlo. (Vidu mian “Epistolo al la Romanoj” B.4.4.)

La alia mito estas en Luko, kaj enhavas similajn elementojn: mirakla naskiĝo, homa patrino, dia patro; anĝelo anoncas tion al paŝtistoj, kiuj trovas la bebon kaj “gloras” Dion pro tio. Ĉi tie, paŝtistoj estas simplaj personoj, t.e. ordinarnaj personoj. T.e., la “miraklo” ne aplikeblas nur al potenculoj, sed ankaŭ al ordinarnaj religianoj.

6) la supreniro de Jesuo

Ĉi tiu rakonto troviĝas en la “historia” libro Agoj. Jesuo, releviĝinte el morta stato, parolas kun siaj disĉiploj. Poste, li altiĝas en la aeron kaj eniras nubon. Anĝelo anoncas ke ii revenos sammaniere.

Kiel la vorto mem indikas, “ĉielo” havas duoblan referenton: la spirita regno, kaj la supera atmosfero. En la antikvaj religioj, la ĉefa dio estis la ĉiel-dio, t.e. tio kio estas super ni. Ankoraŭ nun, la vorto “super” konservas duoblan senceon, “pli alta pozicie” kaj “pli potenca, pli valora, kc.” Oni memoras la sonĝvizion de Jakob, en kiu li vidas ŝtupojn de la tero al la ĉielo, kiujn grimpas anĝeloj. Eĉ en moderna fantazio, la sama simbolismo plu aktivasi. Ekzemple, antaŭ kelkaj jaroj en la sciencfikcia romano *Invito al Ĉielo* de James D. Sayers, la anoj de la enĉiela mondo (Marso) strebas savi la homaron per sia abunde supera scio. Estas ne tute certe ke Sayers ne mem kredis ke la marsanoj efektive ekzistas. La kulto de la Flugantaj Teleroj plu estas aktiva en nia epoko, kaj esenca karakterizaĵo de tio estas la supozo ke la homoj de la teleroj strebas savi nin kontraŭ ni mem. Ĝenerale, sciencfikcio havas kiel karakterizan aspekton pedagogian celon. Do, kvankam ni science ne plu konfuzas la “spiritan” ĉielon kaj la “astronomian” ĉielon, tamen en nia fantazio ia identigo de la astronomia ĉielo kun spirita supereco plu ekzistas.

Do la bildparolo, laŭ kiu Jesuo leviĝis en nubon signifas ke Jesuo nun estas spirito, kaj tio estas preparo por la

pentekosta evento poste okazonta. Nubo estas tio kio kaŝas, faras nevidebla, en populara parolado. (Tre populara idiotismo en la hebrea kaj greka literaturoj.)

Nun oni rajtas demandi, ĉu la verkintoj mem konceptis siajn rakontojn kiel mitojn, aŭ supozis ke ili estis historie realaj? Tiu demando, kvankam legitima, estas erara. *Neniu* popolo agnoskas la mitecon de siaj mitoj. “Historia” aŭ “scienco” vero laŭ unu popolo neeviteble opiniĝas mito laŭ alia popolo. La egiptanoj ne supozis sian rakonton pri Osiro kaj Horo mito. Laŭ ili, ĝi estas konkreta, historie reala evento palpebla kaj konebla. La romkatoliko ne opinias la transformon en la meso mito. Laŭ li, ĝi tute vere okazas. La protestanto ne opinias la kuracojn faritajn de Jesuo mito. Li insistas ke Jesuo kaj ties agado estas historie vera persono kaj vera agado. Kaj cetere, kaj cetere, kaj cetere. Nur la persono kiu staras ekster la specifa medio povas rekoni la mitan karakteron de la mitoj.

En nia propra mondo, ni havas problemon solvendan, nome ke ni devas lerni *rekoni* la mitojn, kaj, samtempe, *kompreni* ilin. Ĉar kiam ni supozas la mitojn raportoj pri historiaj eventoj, ni devas kaj povas nur konkludi ke temas pri grandiozaj eraroj kaj mensogoj. Ĉiu el ni konas la familieran sed falsan pretendon “aŭ Jesuo estis la Filo de Dio, kiel li diris, aŭ li estis la plej granda mensogulo de la mondo” kc. kc. Variantoj de tiu argumento estas vaste uzataj de kelkaj kristanaj grupoj. Sed tio estas falsa kaj erariga dikotomio. Ĝi supozigas ke ekzistas nur du specoj de eventoj: mensogoj kaj materialismaj eventoj. Sed ni scias ke psikaj (spiritaj) eventoj ne devas esti nur materialismaj aŭ mensogaj. Dio estas spirito — nek mensogo, nek materiala. Kaj mita evento povas esti spirite vera, kvankam ne materialisme vera, kaj ne mensogo. (Mi flankenlasos la interesan aferon ke, efektive, nenie en la Biblio Jesuo nomas sin “Filo de Dio.” Kiu mensogas estas ne li sed la fundamentalisto kiu miscitas la biblian

tekston).

Pli konkrete: se ni devas elekti inter nur du respondoj: ke Petro efektive marŝis sur la lago, aŭ ke la verkinto mensogis, ni devos malvolonte elekti la duan eksplikon. Ĉar ni ja scias ke Petro *ne* marŝis sur la lago. Sed tio estas falsa elekto, ĉar ni forgesas la veran respondon. Estas kvazaŭ iu dirus al ni: “Ĉu vi akceptas ke Samariano ja bandaĝis vunditon sur la vojo, aŭ ĉu vi diras ke Jesuo mensogis kiam li rakontis pri tio?” Nia respondo devas esti: nek la unua, nek la dua respondo estas ĝusta. Jesuo ne mensogis, kaj tamen la Samariano ne ekzistis. La Samariano estis simbolo, kaj la rakonto estis parabolo. (Ni mem, niaflanke, decidis ke tiu rakonto estis parabolo. Jesuo ne diris ke ĝi estas parabolo anstataŭ biografia raporto.) Same, ni diras, la rakonto pri Petro kaj la lago estas parabolo (teknike nomata “mito”), nek biografia raporto nek mensogo, kaj ni devas legi kaj kompreni ĝin same kiel ni legas la samarianan rakonton, kiel parabolon (miton).

Sammaniere, ni devas diri: la rakonto pri Osiro estis nek historie vera (materialisme), nek mensogo. Ĝi estis spirite vera, kvankam, niaopinie, nekompleta kaj iom malklare konceptita. Ni opinias ke la spirita vero estas pli klare kaj ĝuste redonita en la rakonto pri Jesuo. Ni povas, kun Eliade, se ni deziras, diri ke la egipta rakonto estis anticipo pri la vero kiu montriĝos en kristanismo. Ni povas, se ni preferas, diri ke la spirita vero en la Osira rakonto estis pli adekvata por la egipta kulturo, kaj la Jesua rakonto por nia. Kiel dirite, pri tio mi ne intencas fari decidon ĉi tie.

REPUBLIC OF THE PHILIPPINES
DEPT. OF PUBLIC WORKS AND COMMUNICATIONS
BUREAU OF POST
Manila

The undersigned, BARTOLOME S. REMIGIO, publisher and printer of BIBLIA REVUO published quarterly in ESPERANTO at Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal, after having duly sworn in accordance with law, hereby submits the following statement of ownership, management, circulation, etc. which is required by Act 2580, as amended by Commonwealth Act No. 201.

NAME

Editor and Owner: DONALD BROADRIBB
Address: Dept. of Semitic Studies, University of Melbourne,
Parkville N.2, Victoria, Australia
Publisher and Printer: BARTOLOME REMIGIO
Address: Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal, Philippines
Office of Publication: Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal

In case of publication other than daily, total number of copies printed and circulated of the last issue dated March, 1966.

1. Sent to paid subscribers.	100
2. Sent to others than paid subscribers	<u>50</u>
Total	150

(Sgd.) BARTOLOME S. REMIGIO
Publisher and Printer

SUBSCRIBED AND SWORN to before me this 1st. day of Oct., 1966 at Malabon, Rizal, the affiant exhibiting his Residence Certificate No. A 6208626, issued at Malabon, Rizal, on Sept. 21, 1966.

(Sgd.) Jose de la Cruz
Notary Public